

2025

La Internacia Tago de Virinoj

Por ĉiuj virinoj kaj knabinoj: Rajtoj, Egaleco, Povigo.



La Komisiono de UEA por Virina Agado

Bitá eldono 2025

Omaĝe al la Internacia Virina Tago

Seminario - Amika Renkontiĝo

Ĉeftemo: Esti Virino

Tempo: 8:00 -12:00 UTC

En tiu ĉi broŝuro troviĝas ĉiuj prelegoj en la virina seminario omaĝe al la
Internacia Tago de Virinoj. Ni kore dankas al ĉiuj kontribuantoj.
Por koseri ĝin kiel historian materialon, ni aldonis babiladojn el la babilejo
kaj fotojn de la seminarianoj.

--- Red.

ISBN 9782940665075

Kompilanto: GONG Xiaofeng (Arko)

Eldono sub aŭspicioj de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

virina-agado@groups.io

MALFERMA PAROLADO

GONG Xiaofeng (Arko), UEA-estrarano pri Virina Agado



Estimataj gastoj, karaj amikoj, karaj fratinoj:

Bonan tageron!

Hodiaŭ estas la Internacia Tago de virinoj.

Estas honore por mi fari paroladon kaj ĝoje renkontiĝi kun vi ĉiuj rete por festi ĉi tiun specialan tagon, kiu apartenas al ĉiu virino kaj knabino.

La Internacia Tago de Virinoj estas ne nur omaĝo al la historiaj kontribuoj de virinoj en ekonomiaj, politikaj kaj sociaj kampoj, sed ankaŭ memorigo por ke ni daŭre klopodu por seksa egaleco, povigo kaj justeco, por certigi, ke ĉiu virino kaj knabino havu egalajn ŝancojn kaj respekton.

Hodiaŭ, ni Virina Komisiono de UEA, restarigita en majo, 2024, unuafoje organizas retan seminarion por festi la virinan feston.

Ni scias, ke la forto de virinoj estas la fundamento por ŝanĝi la mondon — ĉu en familioj, socioj aŭ sur la tutmondaj scenejoj. Same tiel en Esperantujo.

Jam en 1911 ĉe UEA ekzistis Virina Fakoj, En la 70-80-aj jaroj de la lasta jarcento, Komisiono pri Virina Agado de UEA tre aktivis, en 1981 la komisiono organizis semajfinan seminarion por esperantistaj virinoj aktivaj.

Nun, post 40- jara paŭzo, nova komisiono prenis la torĉon daŭrigi la Virinan Agadon. Ni celas forigi antaŭjuĝojn kaj tradiciajn sintenojn, helpi al virinoj akiri memfidon, kuraĝigi ilin aktive partopreni en Esperantaj agadoj.

Ĝis nun ni jam vidas, ke Virina Agado aktivas en UK, VK, ILEI-kongresoj, Landaj kongresoj kaj tiel plu. Multaj virinaj esperantistoj faris/as kontribuojn al E-movado. Ni kore dankas vin.

Fine, Feliĉan virinan tagon.

Ni kune laboru por krei pacan kaj prosperan morgaŭon por la tuta homaro.

Dankon!

Mi anoncas la malfermon de la seminario.

SALUTPAROLO

Duncan Charters, la prezidanto de UEA



Kiel prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, mi kun granda ĝojo salutas ĉi tiun historian seminarion "Esti virino", kiu festas la Internacian Tagon de Virinoj.

Kiel infano, prizorgis min nur virino. Du el miaj unuaj laborestroj estis virinoj, kaj mi konsciis kiom malfacila estis ilia sperto en mondo de viraj direktoroj. Mi ĝojis vidi la progreson de virinoj en mia ĉirkaŭaĵo dum duonjarcento en Usono. Kaj en mia universitato kaj en la Simfonia Orkestro de Sankta-Luiso mi spertis la evoluon de manpleno da virinoj al nombra egaleco, transforma ŝanĝo por ambaŭ institucioj. Tamen malrapidas kompleta transformo kiam ankoraŭ mankas en la mondo egaleco de virinoj en gvidaj pozicioj. Ju pli forta la partopreno kaj influo de virinoj, des pli ni povas progresi al vere egaleca, paca mondo, kaj tio devas speguliĝi ankaŭ en UEA. Ni iom progresis en nia Estraro. Ni finance kaj morale subtenis la antaŭkongresan virinan konferencon en Aruŝo.

Tie servis Esperanto per specifa fokuso al reliefigo kaj disvolvo de la talentoj de virinoj kontribuantaj al nia movado kaj al ilia socio. La Komisiono de UEA pri virina agado estu motoro por certigi la bezonatan progreson en nia komunumo kaj en la mondo. Gratulon kaj dankon pro ĉio kion vi alportis, nun alportas kaj daŭre pli alportos al ĉiam pli evidenta efektivigo de la idealoj de Esperanto.

Dankon.

SALUTPAROLO

Ahmad Mamduhi, ILEI-prezidanto



Estimataj gesamideanoj, karaj amikoj, karaj organizantoj kaj partoprenantoj,

Mi sincere ĝojas havi la privilegion saluti vin ĉiujn okaze de tiu ĉi grava evento por la Internacia Tago de Virinoj. Unue, mi volas esprimi mian plej profundan dankon al la Komisiono de Virina Agado de UEA pro la organizado de tiu ĉi valora seminario.

La Internacia Tago de Virinoj alvokas nin ne nur festi la atingojn de virinoj tra la mondo, sed ankaŭ pripensi la vojon, kiu ankoraŭ restas por atingi veran egalecon. En la Esperanto-movado, kiel en la tuta mondo, la kontribuoj de virinoj estis kaj daŭre estas nemezureble valoraj.

Hodiaŭ, ni memoras kaj honoras la pionirinojn de nia movado — de Klara Zamenhof, kiu oferis siajn personajn rimedojn por la unuaj paŝoj de Esperanto, ĝis Lidia Zamenhof, kiu dediĉis sian vivon al la instruado kaj disvastigado de la lingvo kaj ĝiaj idealoj. Ni ankaŭ honoras Anna Elisa Tuschinski kaj aliajn, kiuj antaŭenigis nian movadon, ofte malgraŭ signifaj baroj kaj malfacilaĵoj.

Sed ni ankaŭ rigardu antaŭen. La spirito de Esperanto estas profunde ligita kun la idealoj de egaleco, respekto kaj inkluzivo. Tiuj valoroj devas reflektiĝi ne nur en niaj vortoj, sed ankaŭ en niaj agoj kaj strukturoj. La Internacia Lingvo estas ilo por ponto-konstruado, kaj tiun ponton ni bezonas konstrui ankaŭ inter la seksoj, kulturoj kaj diversaj vivspektoj.

Mi estas aparte impresita de la riĉa programo, kiun vi prezentas hodiaŭ — de historiaj perspektivoj ĝis aktualaj sociaj demandoj, de artaj esprimoj ĝis personaj spertoj tra diversaj kontinentoj. Tio montras la vastecon kaj profundecon de la virina voĉo en nia komunumo.

Permesu al mi fini per invito al ĉiuj: ni daŭrigu labori por movado kaj mondo, kie ĉiuj voĉoj estas aŭdataj, kie ĉiuj kontribuoj estas valorigataj, kaj kie la egaleco inter viroj kaj virinoj ne estas nur aspirata idealo, sed vivata realaĵo.

Mi deziras al vi ĉiuj fruktodonan kaj tre inspiran seminarion!

Koran dankon.

PROGRAMO

1. ESTI VIRINO – Mirejo Grosjean (Svislando)

KANTO de Vinilkosmo – *Alia Aventuro* verkita kaj komponita de Anna Burenus de la Perdita Generacio (Sveda bando)

2. LIDIA ZAMENHOF – Martha Otto (Germanio)

FILMETO “Virinoj”– de la Kreadaj Laborsesioj ĉe la Europa Centro de Interkultura Edukado el Pollando

3. PIONIRINOJ DE ESPERANTO – ANNA ELISA TUSCHINSKI – Małgosia Komarnicka (Pollando)

KANTO de Vinilkosmo – *Mozaiko* verkita kaj komponita de Kjara kaj adaptita de Federico Gobbo

4. TEMPO RABITA (Radiodramo pri Lidia Zamenhof) – Luiza Carol (Israelo)

5. SEKSO KAJ EGALECO – Anna Löwenstein (Britio)

KANTO okaze de naskiĝtago – *Ĝojan naskiĝtagon* de Kajto; laŭ la vortoj kaj melodio de Luiza Carol; la filmo kun floraj bildoj de la Kreadaj Laborsesioj ĉe la Europa Centro de Interkultura Edukado el Pollando

VIDEO de naskiĝtagaj bondeziroj al Anna Löwenstein de ĉinaj esperantistoj.

6. VIVO DE VIRINOJ EN AFRIKO – Alexandrine Omba (DR Kongo)

7. RONDIRANTA RAKONTO – Alessandra Madella (Italio / Ĉinio)

FILMETO “Pejzaĝoj” de la Kreadaj Laborsesioj ĉe la Europa Centro de Interkultura Edukado el Pollando

8. VIRINOJ EN FLAGOJ – Cristina Bollini (Italio)

KANTO de Vinilkosmo – *Jen li la hom'* verkita kaj komponita de Klarisa kaj adaptita de Giuseppe Castelli kaj Pier Luigi Cinquantini

9. KOMUNA INTERPAROLADO.

ESTI VIRINO



Virinaj kapabloj, virinaj problemoj, virinaj avantaĝoj, virinaj spertoj, virinaj fortoj.

Ie en la mondo: Reagoj de la gepatroj, kiam naskiĝas bebo. Se temas pri knabo: «Ni ricevis infanon». Se temas pri knabino: «Ni ricevis seniluziigon».

Virinoj: duono de la homaro. Eĉ pli, ĉar ili tendencas vivi iom pli longe ol viroj.

Situacio ĉe la **kavernuloj**. Virinoj funde de la kavernoj, viroj ĉe la elirejo, por defendi la kavernon kaj por ĉasi por nutri la familion. Sed nun oni scias pli pri tiuj popoloj: ili ĉasis kaj plukis, kaj multe migris kun la virinoj kaj infanoj. Rezulto: la virinoj enorme portis.

Korpa diferenco: viroj estas pli fortaj laŭ siaj muskoloj. Sed nuntempe iloj anstataŭas muskolan fortikecon, do virinoj povas stiri grandajn kamionojn aŭ uzi maŝinojn.

De jarmiloj la mondo estas markita de **patriarkeco**: povo de viroj. Oni trovas fonton de tio en la Biblio, kies malnova testamento koncernas kristanojn, judojn kaj islamanojn. Mi *legu* el Genezo ĉapitro 1.

«26. Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. 27. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.»

Ni parenteze povas konstati, ke tiu supereco de homo pli alta ol la naturaj estaĵoj kaŭzis kaj kaŭzas katastrofan staton de la naturo nun.

Same regas patriarkeco en aliaj kulturoj kaj religioj, vidu hinduismon: Barato tute ne agadas demokratie, ĉar la vivkondiĉoj de la virinoj estas tre malfacilaj. Viroj kredas, ke ili «posedas» sian edzinon. La edzino estas kvazaŭ havaĵo. Okazas murdo, kiam la edzino volas foriri. Tio estas **Femicido, feminicido** aŭ **virinmortigo**. La murdisto ofte ne estas punata, dependas de la kulturoj kaj ŝtatoj. En Svislando murdisto en tiaj cirkonstancoj estas punata; mi menciuj, ke en la du unuaj monatoj de 2025 okazis en Svislando 8 tiaj murdoj, do po unu en ĉiu semajno. Terura situacio por virinoj.

Okazas multaj perfortoj, **diversaj tipoj de seksaj perfortoj**. Okazas ne nur, ke viro volas seksumadi kun virino sen ŝia konsento. Okazas en militoj, ke viroj penetras la vaginon de la virinoj per tranĉilo, bajoneto aŭ pafiltubo, do detruas la ventron de la

virinoj. La kuracisto Denis Mukwege el DR Kongo provas ripari tiajn virinojn per operacio, pro tio li ricevis la Nobel-Pacpremion.

Antaŭ nelonge la **rajtoj** en la paro estis tre malsamaj: nur la edzo povis subskribi lukontakton, la edzino ne povis labori ekster la familio, ne povis voĉdoni, ne povis decidi pri si mem, ne povis heredi. Ŝanĝoj venis iom post iom tra la dudeka jarcento. Grava punkto en tiu kampo estas la **rajto pri aborto**. Malpermeso, puno signifas, ke la virino ne povas decidi pri sia korpo. Se estas tiel, ni estas ankoraŭ en mezepoko.

Okaze de la mondmilitoj, pro malĉeesto de viroj, **virinoj laboris** en entreprenoj, sur kampoj, ili anstataŭis la virojn en ĉiuj taskoj de la socio. Tio montris iliajn kapablojn.

Virinaj kapabloj

Marie Curie estas la nura persono en la tuta mondo, kiu ricevis DU Nobel-premiojn. Ŝi estis polino kaj laboris en Francio. La intelektaj kapabloj de virinoj atingas **la saman nivelon ol tiuj de viroj**, ili povas esti malsamaj, sed ne subaj. Virinoj povas trovi aliajn vojojn por solvi problemon. Evidente kiam virino devis zorgi pri granda familio, tempo ne restis al ŝi por esplori pri fiziko... aŭ literaturo... aŭ komponi muzikpecon.

Molière diris (Molière, franca verkisto de la 17-a jarcento): «Virinoj estas aŭ pli bonaj aŭ pli malbonaj ol viroj». Vidu Patrino Tereza... Kiam virino estas aĉa, malbona, malbonkora, ŝi estas terura, aĉega.

Pluraj virinoj estas **ŝtatestriinoj**, demokratie elektitaj. Unu ekzemplo: Helen Johnson Shirleaf en Liberio. Nun alproksimiĝas elekto de posteulo por Antonio Guterres, ĝenerala sekretario de UN. Listiĝas kvar virinoj por tiu posteno. Mi vidis en UN Ĝenevo **Michèle Bachelet** el Ĉilio, kiam ŝi estis alta komisiito pri Homaj Rajtoj. Ŝi studis medicinon kun nia samideano José-Antonio Vergara. Mi parolis kun ŝi pri li, ŝi memoris. Mi parolis al ŝi pri Esperanto evidente. Mi tre admiras ŝiajn raportojn kiel alta komisiito: ŝi parolas 15 minutojn: 5 minutoj por listigi la faktojn, 5 minutojn por analizi la faktojn, 5 minutojn por skizi la farendaĵojn. Brila virino!

Mi spertis **porvirinan kunvenon** ĉe UN. Invito de Fonduso de Elleanor Roosevelt. Mi aŭdis tre konkretajn proponojn, ne longajn paroladojn, regis tute alia etoso ol dum la kutimaj miksitaj kunvenoj.

Virinaj problemoj

Virina problemo: Vivi en patriarkeco. Ne povi studi. Ne povi eliri el la domo. Feminicidioj. Vidu Afganion, Iranon. Ni nepre subtenu la virinojn en tiuj landoj.

Virina problemo: Honormurdoj. «**Vivbruligita**» En ŝoka libro virino rakontas sian vivon: ŝi estis analfabetino, gardis ŝafojn en la kampo, tie ricevis viziton de junulo, kiu promesis al ŝi geedziĝon. Ili seksumadis. Ŝia familio eksciis kaj «devis» puni ŝin: verŝi sur ŝin benzinon kaj funkciigi alumeton... por «lavi la honoron» de la familio. Ŝi brulis. Oni metis ŝin en hospitalon, ŝi ne mortis. Oni metis ŝin en iu fora ĉambro fine de koridoro, kie ŝi ne ricevis kuracadon. En iu forgesita loko. Alvenis en la hospitalo delegito de la Ruĝa Kruco. Flegisto manmontras al tiu delegito la koridoron, kaj tiu delegito trovas la junulinon en terura stato. La Ruĝkruculo sukcesas

preni ŝin al Eŭropo, organizi flegadon kaj organizi, ke la viktimo rakontu sian vivon. Jen resumo de tiu libro «Vivbruligita».

Virina problemo: Menstruoj, doloroj. Studoj montras, ke dum la menstruo virinoj havis sukceson en olimpikaj ludoj, faris elstarajn paŝojn en konfliktoŝolvado. Tiu momento en la vivo de virino povas esti dolora, sed povas ankaŭ esti fruktodona. Mi legis: virinoj havas eksterordinaran kapablon: ili perdas sangon sen morti.

Diversaj malsanoj koncernas nur virinojn, oni ne multe esploras pri ili, ĉar la kuracistoj estis ĉefe viroj. La medicinaj esploroj kaj enketoj ofte ne koncernas 50% de virinoj, do la esploro pri efiko de substanco ne kongruas kun la realo.

Virinaj avantaĝoj

Laŭ la poemo de Raymond Schwartz.

Mi vidas kaj mem konstatas la avantaĝojn por maljunaj virinoj. En pluraj socioj oni aŭskultas ilin, ili gravas en la familiaj decidoj. Kelkaj estas saĝaj, kelkaj estas diktatorecaj kaj venenigas la etoson en la familio.

Raymond Schwartz: el «La Stranga Butiko»

LA DIVERSAJ AĜOJ DE L' HOMO

En supra ĉambro, lulo ... lulo ...
Anĝele dormas la etulo:
Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras
Kaj pri la bela mondo miras:
Miraĝo.

Jam ne plu side li tamburas,
Sed tra la dom' explore kuras:
Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)
Revenas el stratbubaj bandoj:
Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo
Knabinon ĉien sur la vojo:
Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon:
Por fondi kune novan domon:
Domaĝo.

Li tiam estas tre utila
Fortika viro, kvankam vila:

Vilaĝo.

Kaj post rapida tempopaso
Postrestas nur senviva maso:
Masaĝo.

P. S.
Ni ne apliku al Virino
Ĉi tiun viv- kaj rimo-saĝon,
Ĉar de l' komenco ĝis la fino
Ŝi ĉiam havas saman aĝon:
Avantaĝo

Virinaj spertoj

Miaj gepatroj havis kvar filinojn. Ili volis, ke ĉiu ludu muzikinstrumenton, ĉiu povu studi laŭ siaj kapabloj. Pro tio ili rezignis posedi veturilon, ili devis vivi ŝpareme. Tia sinteno ne estis la regulo. Mi estis tre bonŝanca vivi en tia familio.

Mia edzo laboris duontempe, mi laboris duontempe. Niaj infanoj estis edukitaj same multe de li kiel de mi. Foje li diris: Se devas esti estro en nia familio, estos mi. Sed tia situacio ne okazis.

Mi konstatis la **sintenon de viroj al virinoj** en plej diversaj landoj, sed tio estus alia prelego.

La complicité féminine, franclingva esprimo tre trafa por esprimi la fratinecajn rilatojn inter virinoj. Por trovi taŭgan esprimon en EO mi lanĉis diskuton inter kelkaj altnivelaj personoj, viroj kaj virinoj. La rezulto estas: **intervirina kunsentemo**. En tiklaj situacioj virinoj tuj kunlaboras, tuj fidas unu la alian, tuj helpas unu la alian. Viroj inter si tendencas iri al rivaleco. Viroj ne komprenas tiun interviran kunsentemon, ne sentas, ne povas travivi tion.

Oomoto kun **virina gvidanto** estas ŝintoisma komunumo en Japanio. La etoso tie estas por mi tre agrabla. Fakto estas, ke ĉiuj kunlaborantoj, viroj, agadas sub la ordonoj de virino, kiu situas tute supre de la hierarkio. Do ili kutimas respekti virinojn.

Alia sperto: Masaĝo kun Ikeda Sensei en kurso pri Shiatsu. Alvenis malsana virino. Li petis, ke ŝi kuŝiĝu kun ventro sube kaj dorso supre. Li palpis la vertebraron. Li petis, ke **mi masaĝu** la suferantan personon en iu preciza loko de la vertebraro, kiun li trovis. Mi reagis dirante: «Se vi masaĝumas, la efiko estos pli granda, ĉar vi estas Majstro!». Li respondis: «Ne, bonvole faru, la efiko estos pli bona, ĉar vi estas virino.»

Kiel instruisto mi **DEVIS menci la profesiojn kun du formoj**: elektrikisto-elektrikistino, kuracisto-kuracistino. **Nur se oni nomas la aĝon, ĝi fariĝas realo**. Oni asertas, ke profesoro povas esti viro aŭ virino, tamen tio ne funkcias en la menso de la homoj.

Ĉu vi volas pruvon? Bonvolu forgesi la teoriojn kaj aŭskulti mian rakonton.

Patro kaj filo veturas kune, la filo stiras. Iam abrupte la aŭto forlasas la straton

kaj kolizias kun arboj en la apuda arbaro. La du personoj estas severe vunditaj. Alvenas ambulanco. Oni portas la du vunditojn al proksima hospitalo. Tamen la filo mortas. La patro ne komprenas, kial la filo tiel danĝere stiris, kio okazis, li volas scii, ĉu la filo prenis drogojn, aŭ subite malsaniĝis.... Pro tio la patro petas, ke oni faru nekropsion. Oni portas la kadavron de la filo en la adekvatan ĉambron kaj tie atendas fakulo pri tiaj esploroj. Tiu fakulo, malkovrante la vizaĝon de la kadavro diras: «Mi ne povas fari tiun laboron, ĉar temas pri mia filo.»

.... Vi pripensas. Bone, ... pripensu!

Se vi demandas al vi, ĉu tiu filo fakte estis adoptita, kaj tiam la kadavro alvenas al la manoj de la biologia patro..... tiam viaj hezitoj pravas, ke la vorto «fakulo» nepre rilatas al VIRO. Se por vi la vorto «fakulo» povas rilati same bone kun viro aŭ virino, vi tuj pensos: temas pri la patrino! Do nun vi povas konstati, kiel niaj mensoj ĝenerale funkcias: la plimulto de la aŭskultantoj hezitas kaj pensas pri alia patro, dua patro, ne pri patrino.

Virinaj fortoj

Ne estas profesio nur por viroj.

Kapablo komuniki. Komence komunikado okazas por la patrino kun bebo dum mamnutrado. Virinoj zorgas pri bona komunikado, sekvas kursojn por lertiĝi pri bona komunikado (ne ĉiam kompreneble....) Komuniki, bone kaj efike komuniki, pli interesas la virinojn ol la virojn.

Kapablo solvi problemojn kaj konfliktojn. Pacdiskutoj kun virinoj funkcias pli bone, ol se nur viroj kunsidas kaj diskutas. En pacdiskutoj devus esti **50% da virinoj kaj 50% da viroj**. En ĉiu delegacio. Plie devas esti etaj grupoj el nur virinoj, tie naskiĝos pacsolvoj; unu el ili raportu pri la rezultoj en la pleno. Tiel devas esti, ĉar kelkaj virinoj kutimas silenti en ĉeesto de viroj. Bedaŭrinde. Espereble tio evoluos.

Konklude

Virinoj havas decidigan taskon: **eduki** knabojn. Knaboj (kaj knabinoj) devas lerni **RESPEKTON**, tiel la komuna vivo estos pli justa. Do gravas la edukado, en la familio kaj en la lernejo, edukado al RESPEKTO de la aliaj personoj, de la aĝoj, de la naturo. Tiel la **Homaj Rajtoj** estos respektataj. Tio estas la unua paŝo al **PACO**.

Martha Otto (Germanio)

LIDIA ZAMENHOF



Lidja Zamenhof, kor' fervora,
Vartanta patran sent-heredon,
Jen, serĉas sorĉan sav-rimedon
Por mond' amara kaj dolora.

Kaj kun entuziasmo kora
Servadas la Bahaan kredon,
Lidja Zamenhof, kor' fervora,
Vartanta patran sent-heredon.

El sent' profunda, pens' valora,
En sino havas riĉan bedon,
El ili plektas florbukedon:
Novelojn kun enhav' trezora,
Lidja Zamenhof, kor' fervora.

Tiun rondelon pri Lidia Zamenhof skribis Kalman Kalocsay en 1931 - kaj prezentis ĝin en la galerio de eminentaj esperantistoj, verkistoj, scienculoj antaŭ ol ŝi famiĝis kiel internacie rekonata Ĉe-instruistino.

Lidia naskiĝis la 29-an de januaro 1904 en Varsovio kaj mortis en septembro 1942, gazumita en la ekstermejo Treblinka.

En 1992 mi estis tie kun grupo de BELanoj kaj Roman Dobrzynski - terure forta, emocia sperto por ni ĉiuj....

Lidia estis la plej juna filino de d-ro Zamenhof, nomita dorlote Lilka, (pluraj esperantistoj nomis ŝin "fraŭlino Lili") kaj la plej aktiva en la Esperanto-movado el ĉiuj tri infanoj de d-ro Zamenhof.

Ŝi dediĉis sian tutan vivon al Esperanto, agante tre fruktodone je pluraj kampoj de la movado.

Ekde sia sesa ĝis la deka jaro ŝi estis instruata hejme, poste frekventis la “Realan Virinan Lernejon” en Varsovio, kiun ŝi finis en majo 1921 per matureca ekzameno.



Lidia Zamenhof, en 1907



Lidia Zamenhof, 1910

Dum Lidia estis lernantino, la gefratoj Adamo kaj Sofia estis jam plenkreskitaj - ambaŭ fariĝis kuracistoj.

La familio vivis pli bonstate ol antaŭe kaj trovis pli da tempo por sia plej juna filineto. Estas sciata ke la patro ofte helpadis al ŝi en la preparo de hejmaj taskoj.

En septembro 1921 Lidia estis akceptita en la Jura Fakultato de la Varsovia Universitato. En novembro 1925 ŝi ricevis la diplomon de magistro pri juro. Lidia estis la unua juristo en la familio de d-ro Zamenhof, kiu grandparte konsistis el kuracistoj.

Jam dum la lernejaj jaroj Lidia spertis malbonon pro antisemitismo, kaj ŝi estis konscia pri la limigitaj eblecoj fari juristan karieron. Pro tio, eble ĉefe tial, ke logis ŝin labori por la realigo de la homaranismaj ideoj de ŝia patro, ŝi ne entreprenis aktivadon en sia profesio.

En sia junaĝo Lidia ne estis interesita pri Esperanto. Maksimume ŝi interesiĝis pri la koloraj poŝtmarkoj, kiuj troviĝis sur la leteroj venantaj al ŝia patro el multaj landoj. Estas konata ŝia konduto kaj la eldiro dum solena hejma renkontiĝo okaze de la 50-a naskiĝa datreveno de d-ro Zamenhof en 1909. Tiam ŝi estis nur kvinjara knabineto kaj sidis apud la patrino en la salono, inter eminentaj gastoj. Ili interparolis kompreneble en Esperanto. En unu momento Lidia saltleviĝis kaj diris pole: “Pri kio ili babilaĉas? Mi eĉ unu vorton ne komprenas!” - kaj ofendite forlasis la ĉambron.

Tiu fakto i.a. atestas ke jam frue evidentiĝis en ŝia karaktero sendependeco, kaj tion la gepatroj plene respektis.

Al Lidia, havante nur naŭ jarojn, la patrino ‘minacis’ ke, se ŝi ne lernos Esperanton, ŝi ne povos vojaĝi kun la gepatroj al la 9-a Universala Kongreso en Berno, Svislando, 1913.

Mirinde, dum ses semajnoj Lidia eklernis la lingvon, kaj dum la kongreso, ŝi sentis la amikan etoson kaj la respekton, kiujn ĝuis ŝia patro. Tio, esence ŝanĝis ŝian antaŭan sintenon al Esperanto, ŝi fariĝis iom post iom pli konvinkita kaj bona esperantistino.

Malbonaj spertoj en la lernejo, kiun ŝi frekventis, kie ofte evidentiĝis naciismo, proksimigis la junulinon al la homaranismaj ideoj de la patro, kio poste influis ŝian vivon.

Lidia estis muzikema, same kiel Adamo; ŝi ludis fortepianon, Adamo violonĉelon. Per sia ludado ili konsolis la patron, jam tre malsanan dum liaj lastaj jaroj,



Gesinoroj Zamenhof kun gefiloj Adamo kaj Lili (1916).

Familio Zamenhof, 1916

Lidia ankaŭ bone pentris, kio poste multe helpis al ŝi, kiam ŝi fariĝis Ĉe-instruistino. Por la lecionoj ŝi kapablis preparadi amason da diversspecaj helpiloj-rekvizitoj nepraj por la Ĉe-metoda instruado.

Dum siaj lernejaj jaroj Lidia ne apartenis al la plej unuaj. Tio estis verŝajne kaŭzita de la malfavoraj cirkonstancoj de lernado dum la militaj jaroj.

La morto de la amata patro en 1917 kaj pluraj aliaj dramaj eventoj, kiuj tiatempe trafis la Zamenhof-familion, tutcerte ankaŭ negative influis.

Tre grava trajto de ŝia karaktero estis la konsekvenca realigo de la planoj entreprenitaj; malgraŭ fizika malforto kaj la ardeco en la agado.

Lidia estis tre interesita pri la pola literaturo kaj opiniis, ke nepre oni devas konigi ĝin vaste per Esperanto. Havante nur 13 jarojn ŝi jam faris tradukojn el la pola en Esperanton. Ekzemple ŝi ankaŭ tradukis la verkon “Quo vadis” de Henryk Sienkiewicz.

Lidia ankaŭ plene engaĝiĝis en la organizaj laboroj de la movado. En 1921 la familio Zamenhof kaj aro de amikoj fondis la Esperantistan Rondon Konkordo kun la celo disvastigi la homaranismajn ideojn de d-ro Zamenhof. Li iam komprenis ke nura lingvo ne sufiĉas por unuigi la mondon. Bezonatas ankaŭ morala fundamento bazita sur la ora regulo: “Traktu ĉiujn tiel, kiel vi ŝatus esti traktata.”

Lidia fariĝis sekretario de Konkordo kaj plenumis tiun funkcion dum pluraj jaroj kun granda engaĝiĝo.



E-o rondo Konkordo je la tombo de L.L.Zamenhof, Varsovio 1923

Ŝia aktivado en la internacia Esperanto-movado komenciĝis dum la 16-a UK en Vieno, 1924. Dum tiu kongreso ŝi evidentigis diversflankan aktivecon. Libere kaj decide ŝi esprimis sin kontraŭ la proponitaj lingvaj ŝanĝoj, kiuj povus kaŭzi skismon en la movado. Ŝi asertis, ke kelkaj el la parolantoj konfuzas evoluon kun anarkio. Evoluo, laŭ ŝi, povos sukcesi nur sub la influo de ioma disciplino. En tiu grava, esenca afero ŝi sekvis sian patron, d-ron Zamenhof.

Dektrijara Lidia perdis la amatan patron. Post la Viena kongreso mortis ŝia patrino.

Lidia estis jam tiam tre engaĝita en la Esperanto-movado kaj venis al la konvinko, ke kun ŝiaj aspiroj ne akordiĝas la fondiĝo de familio kaj la ordinara rolo de edzino. Tiatempe tute neordinara kaj kuraĝa decido! Ŝi ne interesiĝis pri dom-mastrumado kaj neniam sentis emon al edziniĝo. Eĉ kuiri ŝi neniam lernis.

Tiam ŝi estis influata de feminismaj ideoj - kaj por la egaleco de virinoj ŝi batalis dum sia tuta vivo. Ŝi decidis plene sin dediĉi al la Esperanto-idealaj: nome la Interna Ideo. Ŝi batalis ke ‘ne ekstingiĝu la fajro’ de idealisma esperantismo. La homaranismajn ideojn ŝi provis disvastigi dum la sinsekvaj kongresoj. Ŝi esti tre talenta parolantino; kelkaj opiniis, ke en tio ŝi similas al Edmond Privat - kompreneble ne ekstere....



Lidia - Edmond Privat - Klara en Universala Kongreso de Esperanto en Vieno 1924

Jen kelkaj frazoj el tiu kortuŝa kaj pensiga parolado dum kunveno de Konkordo en la 17-a UK en Ĝenevo en 1925, ĉar al la idealoj tie esprimitaj ŝi restis fidela ĝis sia martira morto:

....“ankaŭ vera esperantisto ne estas ĉiu, kiu ornamas sin per verda stelo, se li eĉ tre flue parolus la lingvon internacian. Se en Esperanto ni vidus sole la helplingvon, nenion plu, ni nomus nin eble kolegoj, eble samlingvanoj, sed Ne samideanoj. Ĉar la ideo de Esperanto estas pli profunda.... Se vi tion ne sentas - deŝiru la verdan ornamaĵon de viaj ĉapeloj, vestoj kaj kravatoj, ĉar tiun stelon oni devas porti ne Sur la brusto, sed En la brusto. Sen nia Interna Ideo Esperanto similus al lampo sen lumo, al preĝejo sen Dio.... Multaj homoj komprenas amon por sia patrujo kiel identan kun malamo kontraŭ la aliaj. Samideanoj! Ni ĉiuj, pace, premante al ni la manojn, estas plej bona atesto, ke en homaj koroj estas sufiĉe da loko por la tuta homa gento. Kaj ni, civitanoj de Esperantujo, estas en niaj nacilandoj pli bonaj patriotoj ol filoj de Ŝovinujo, dividintaj sian patrujon per muro de malamo de la tuta mondo.... Niaj voĉoj eble longe ankoraŭ estos voĉoj de vokantoj en dezerto; sed fine ilia eĥo iros per forta voko tra la mondo kaj vekos dormantajn korojn ĝis la bela sonĝo de l’homaro por eterna ben’ efektiviĝos!”



Lidia Zamenhof, 1925

Dum la tuta intermilita periodo Lidia estis tre aktiva en la pollanda kaj internacia movado, ĉiam pli vastigante la kampojn de sia agado. Ĉion ŝi faris kun granda sindediĉo. Ŝi estis tre ŝatata inter la esperantistoj, kiuj vidis en ŝi la daŭrigantinon de la laboro de ŝia patro.

Dum la Ĝeneva Universala Kongreso de 1925 okazis fakkunveno de la bahaaj esperantistoj al kiu Lidia estis invitata. Ŝi tute ne deziris tien iri, sed fine, pro ĝentileco, ŝi tamen partoprenis kaj konatiĝis kun Martha Root, esperantistino el Usono, kiu oficiale reprezentis la Bahaan Kredon. Lidia sentis sin kiel ateisto kaj ne interesiĝis pri religiaj aferoj. Tamen, la kontakto kun Martha ne ĉesis.

Por la 18a de aprilo 1926 estis fiksita la inaŭguro de la tombo-monumento al d-ro Zamenhof, al kiu ankaŭ Martha estis invitata. La solenaĵo okazis en la ĉeesto de reprezentantoj de la pola registaro, la varsovia urbestro, la juda komunumo, esperantistoj kaj kelkaj eksterlandanoj. Post meto de floroj, oni invitis Marthan kune kun aliaj eminentaj gastoj por akcepto en la Zamenhofa familia hejmo. Lidia kaj Martha amikiĝis kaj loĝis kune dum dusemajna restado. Lidia promesis al ŝi perfektigi en Esperanto kaj Martha reciproke helpi al Lidia, en la angla. Faciligis tion reciproka persona fascino.

Lidia ne nur ekstere similis al sia patro, sed eĉ pli multe interne.

En 1929 ŝi publikigis artikolon pri la Bahaa Kredo en pollingva juda gazeto. Tio ŝokis la familion kaj multe pli la judan komunumon kaj kelkajn esperantistojn. Por pluraj personoj ŝia ĉi-direkta evoluo ne estis komprenebla, nek akceptebla. Ŝajnis al ili strange, ke tiel memstara menso, tiu virino ĉiam batalanta por sendependeco de virinoj, povis tiel forte sin subigi al tiu religio kaj al la decidoj de ĝia gvidanto. Ŝi mem klarigis tion tiel, ke la Bahaa Kredo estas plia, pli alta ŝtupo de la homaranismo de ŝia patro. La humanismaj ideoj de tiu religio, pli morala ol eklezia, certe allogis ŝin. La egaleco de homoj, sendepende de raso, nacieco aŭ religio; la pureco de la vivado; la nekonsumado de alkoholo kaj cigaredoj; la juste alta takso de virinoj kaj similaj idealoj; kaj ĉefe la ideo pri internacia lingvo kun apogo de Esperanto estis proksima al ŝia koro. Certe, ĉion kion Lidia entreprenis, ŝi faris kun plena dediĉo.



Lidia Zamenhof en 1930

En 1930 Lidia vojaĝis, t.e. pilgrimis, al Haifo en Palestino, sankta loko por bahaanoj, kaj renkontis Shoghi Effendi, la tiaman gvidanton de la Bahaa Kredo. Dum preĝado en la Sanktejo en Haifo Lidia rakontas pri forta spirita sperto en la biografio de Wendy Heller “La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto”

....kiam mi preĝis la sento de tristeco kaj deprimado malaperis kaj kreskanta ĝojo inundis mian koron...

Siatempe ŝi decidis lerni la Ĉe-metodon por instrui Esperanton eksterlande.



Lidia Zamenhof, 1933

(vigla instruistino sen libro por kapti la atenton de la lernantoj)

La Esperanto-movado tamen ne plu estis tiel favora al Lidia kiel antaŭe, ĉar parte oni malŝatis, ke membro de la Zamenhofa familio aktivis por la disvastigo de la Bahaa Afero, timante ke la publiko ekkredus, ke la Esperantismo estas intime ligita al iu religia kredo.



Lidia Zamenhof, 1935

Ŝi tre sukcese instruis Esperanton en multaj europaj landoj - Svedio, Francio, Nederlando, Anglio, Skotlando, Austrio- ĝis la usonaj bahaanoj invitis ŝin veni al Usono en 1938 por instrui Esperanton tie.



Nordamerika Esperanto Kongreso en Cleveland 1938

En septembro 1939 eksplodis la Dua Mondmilito kaj Lidia suferis la saman sorton kiel ĉiuj polaj judoj. Kiam la usonaj amikoj ne sukcesis pluvalidigi ŝian vizon, ŝi samtempe riskis perdi sian polan naciecon. Do, ŝi reenvojaĝis al Pollando, devis vivi en la varsovia geto en teruraj kondiĉoj, donis lecionojn pri angla lingvo por vivteni sin. La esperantistoj ne forgesis Lidian kaj sendadis pakaĵojn al ŝi. Germana bahaa soldato kaj pola esperantisto eĉ klopodis ebligi al ŝi fuĝon, sed Lidja rifuzis. Ŝi ne volis forlasi siajn familianojn kaj amikojn.

En 1942 la Nazioj komencis grandskalan eksterminadon de la judoj en Varsovio. Ŝajnas esti sufiĉe certa ke en somero 1942 ŝi estis transportita al la koncentrejo Treblinka kaj tie murdita kiel pli ol unu miliono da samsortanoj. En aprilo 1943 la varsovia geto estis definitive "likvidita" far la Nazioj.

La mesaĝo de Lidia Zamenhof estis la unueco de la homaro, la interfratiĝo de la homoj, la emancipiĝo de la virinoj kaj la batalo por monda paco. Ĉio ĉi radikis en la homaranismo proklamita de ŝia patro kaj en la instruoj de la Bahaa Kredo.

Bedaŭrinde tre mallonga estis la vivo de Lidia, la plej juna kaj kara infano de la granda kreinto de la lingvo internacia. Nobla, bonkora, idealismoplena, altanima, servopreta estis Lidia Zamenhof, kiu meritas indan lokon en la Esperanta Panteono. Ŝi estas unu el la virinoj kiu ege inspiras min.

Honoron al ŝia memoro!

Heide Martha Otto martha.otto@gmail.com

Libroj:

- LIDIA - la vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto - Wendy Heller, 1985, 2007
- Por ke la tagoj de la homoj estu pli lumaj, Originala verkaro de L.Z. kun artikolo "Kiel mi ekkredis" L.Z. 2008
- Lidia Zamenhof - Vivo kaj agado - leteroj k dokumentoj 1925 - 1941 - Isaj Dratwer, Israelo 1978
- La Zamenhof Strato - biografio en formo de intervjuo kun Krystoph Zaleski-Zamenhof - Roman Dobrzyinski
- Baha'u'llah kaj la Nova Epoko (1930, 1978) - J.E.Eslemont - tradukis Lidia Zamenhof
- Atesto pri Lidia Zamenhof el Yad Vashem

ANNA ELISA TUSCHINSKI (1841-1939)

- la "Esperanto-Patrineto"



1. Enkonduko.
2. Familia vivo.
3. Esperanta vivo.
4. La intermilita periodo.
5. Konkludo.
6. Bibliografio.

1. Enkonduko

Serĉante informojn pri la pionirinoj de la Esperanto-Movado, mi trovis interalie mallongan noton pri Anna Elisa Tuschinski. Mi devis ekscii, kial oni nomis ŝin "Esperanto Patrineto" kaj kio kaŭzis, ke ŝi decidis lerni Esperanton en tiel malfrua aĝo, havante jam 60 jarojn (aŭ pli).

Anna Elisa Tuschinski estas bela figuro kaj tre grava por la Esperanto-Movado. Similaj al ŝi agantinoj estis multaj. Hodiaŭ, signifa parto de ili estas forgesita, kaj ja ili funkciis en tempoj de la domina pozicio de viroj, kiam, mallonge dirante, virinoj havis malmulte da lokoj en la publika, socia kaj politika vivo... Ili ne cedis, sed kuraĝe sekvis siajn celojn...

2. Familia vivo

Anna Elisa Tuschinski naskiĝis la 4-an de decembro 1841 en Gdańsk (tiam ĝi estis parto de la Reĝlando Prusio). Ŝi estis la filino de germana komercisto, Gustav Lorwein kaj polino, Adela Juchnowicz.

Profesie ŝi estis instruistino kaj instruis en lernejoj en Gdańsk, en urbkvartalo Wrzeszcz. Ŝi ankaŭ loĝis tie, ĉe hodiaŭa strato Matka Polka (Pola Patrino). Ŝi geedziĝis kun la komercisto Karol Tuschinski, kun kiu ŝi havis filinon. Ĉirkaŭ 1890 ŝi estis vidvino.

Ni konas nur tiujn detalojn de ŝia familia vivo kaj faka agado. Ni scias pli da detaloj el ŝia "Esperanta vivo".

3. Esperanta vivo

Kiam ŝi estis pli ol 60-jara trovis broŝuron por lerni Esperanton „Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro”. Ŝi estis ravita per tio, ke la lingvo estas tre logika kaj rapide mem lernis ĝin. Ŝi komencis organizi lingvajn kursojn de

Esperanto, instrui kaj popularigi ĝin. Esperanto fariĝis ŝia vivpasio. Ŝi estis nekontestebla pionirino de la Esperanto-Movado en Gdańsk (tiam Danzig). En novembro 1907, en la aĝo de 66 jaroj, ŝi fondis la unuan Gdańsk Esperanto-Societon ("Danziger Esperanto Verein"), kiu rapide komencis disvolviĝi kaj aktive funkcii. Ĝis 1910 ĝi havis pli ol 100 membrojn.

En 1908, Anna Tuschinski partoprenis en la 4-a Universala Kongreso de Esperanto en Dresdeno. Kiel delegitino ŝi partoprenis en la kunveno de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Dum la kongreso ŝi renkontis la kreinton de la lingvo Esperanto, Ludovikon Zamenhof, kaj dancis kun li, malfermante la tradician kongresan balon.

De la 22-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1912 danke al ŝia klopodo estis organizita en Gdańsk kaj Sopot la 7-a Germana Esperanto-Kongreso. Ankaŭ estis eldonita, inter aliaj, la unua gvidilo tra Gdańsk en la lingvo Esperanto "Gvidlibro tra Dancigo".

4. La intermilita periodo

La unua mondmilito bremsis la agadon de Anna Tuschinski, sed post la milito ŝiaj klopodoj faris plian disvolviĝon de la lingvo Esperanto en la urbo, jam en la Libera Urbo Gdańsk.

En 1920, proksimume 130 lernantoj lernis Esperanton en Gdańsk. Ĝi estis instruita en ses klasoj. Du jarojn poste, en 1922, kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio, Anna Tuschinski organizis la Gdańskan Kongreson de Esperantistoj. En ĝi partoprenis 150 esperantistoj, inkluzive de eksterlandaj gastoj. Unu el la gravaj gastoj estis: Klara Zamenhof. La Esperanto-Movado disvolviĝis tre bone en Gdańsk. En 1924, dum la 2-a Internacia Gdańsk Foiro (Danziger Messe), la urbodomo unuafoje eldonis informmaterialojn ankaŭ en Esperanto.

La kunlaboro de Tuschinski kun Universala Esperanto-Asocio vekis ŝian esperon organizi internacian kongreson en Gdańsk. Ŝia revo realiĝis en 1927. La 19-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Gdańsk kaj Sopot. Ĝi estis unu el la plej gravaj kaj plej grandaj okazaĵoj de la intermilita periodo. Pli ol 920 personoj el 40 diversaj landoj partoprenis en ĝi. Anna jam havis 86 jarojn kaj, kiel Honora Prezidantino de la Kongreso, ŝi faris la malferman paroladon.

La kongreso estis perfekte preparita. Estis eldonitaj 22 memorbildkartoj kaj specialaj eldonaĵoj, oni preparis ankaŭ multajn materialojn kiel afiŝojn. Ĝuste en Gdańsk estis establita en 1927 la "Esperanta Librotago". Ĝi estas festata ĝis hodiaŭ, la 15-an de decembro. Feliks Zamenhof, la frato de Ludoviko Zamenhof, proponis fondi la unuan Esperanto-Muzeon. La propono estis akceptita kaj du jarojn poste ĝi estis efektivigita. La muzeo estis fondita en Vieno. Dum la kongreso la 31-an de julio, okaze de la 40-a datreveno de la kreo de la internacia lingvo Esperanto, en maldensejo Dolina Echa (Eĥa Valo) estis ceremonie plantita la "Jubilea Kverko". La kverkaj radikoj estis kovritaj per grundo alportita el diversaj landoj. Proksime de la kverko estis lokita roko kaj vojmontrilo "Esperanto-Vojo". Sur la marmora tabulo alkroĉita al la roko estis surskribo en du lingvoj: Esperante kaj germane, kiu informis pri la kongreso kaj la plantita kverko.

Anna Tuschinski akiris meritoplenan rekonon en la internacia Esperanto-Movado - oni nomis ŝin "Esperanto Patrino", sed ŝi estis ankaŭ vaste respektata en Gdańsk. Lokaj gazetoj skribis pri ŝia naskiĝtago.

La dua mondmilito estis sekva granda defio por Anna Tuschinski kaj ankaŭ por multaj esperantistoj. Grandega bato estis la dehakado de la "Jubilea Kverko" kaj la frakasado de la memortabulo fare de la nazioj en la nokto de la 12-13-a de novembro 1938.

5. Konkludo

Anna Tuschinski okupiĝis pri la Esperanto-Movado ĝis la fino de sia vivo kaj ŝi restis fidela al la ideoj de la lingvo Esperanto: kunigi homojn en la mondo, malfermiĝi al aliaj homoj kaj eduki sin. Ŝi mortis la 9-an de oktobro 1939 en okupata de nazioj Gdańsk, en la aĝo de 98 jaroj.

Martha Root, usona ĵurnalistino, skribis ke Anna Tuschinski estis "silenta, estimplena, ne alta, svelta, ĉiam ridetanta, dotita per granda humuro, facilmove moviĝanta kaj daŭre dancanta kun junuloj dum Esperanto-baloj kaj neformalaj festoj".

En 2020, ŝi estis proponita kiel la patronino de unu el la tramoj en Gdańsk. Estas la iniciato de tiu ĉi urbo nomi tramojn laŭ la plej eminentaj Gdańsk-personoj.

En 2023, ŝia vivo estis montrita en du-minuta dokumenta filmo "Wrzeszczanki" (produktita fare de la Palma Fondaĵo).

Anna Elisa Tuschinski estas ne nur pionirino de la Esperanto-Movado en Gdańsk, instruistino, fondintino de la unua Gdańsk Esperanto-Societo, nomata "Esperanto Patrino", sed ankaŭ ŝi estas bela ekzemplo de virina forto kaj saĝeco.

6. Bibliografio

1. „Anna Eliza Tuschinski (1841–1939)”. Komitet Obchodów 500. Rocznicy Reformacji na Pomorzu (w języku polskim).
2. Daniluk, „90 lat od spotkania esperantystów w Gdańsku”. Trojmiasto.pl (w języku polskim).
3. Root, Martha. „Co ma Gdańsk: Jak zorganizować Powszechny Kongres Esperanto w swoim mieście”(PDF). Star of the West .1927.
4. Antoniewicz, Grażyna „Gdańsk – Mateczka esperantystów”. Dziennik Bałtycki (w języku polskim).
5. Grygorcewicz Weronika, „Anna Eliza Tuschinski”. Metropolitanka (w języku polskim).
6. Golec Józef, „Gdański ruch esperancki 1907–2007, Sopot 2008.
7. Daniluk Jan, „Esperanto i esperantyści w Gdańsku”, „Dwudziestolecie pomiędzy. Miniatury o Wolnym Mieście Gdańsku (1920–1939), Gdańsk 2022, s. 45–51.
8. <https://plus.dziennikbaltycki.pl/gdansk-mateczka-esperantystow/ar/12427282>
9. https://pl.wikipedia.org/w/index.php?title=Anna_Elisa_Tuschinski&oldid=71798144
10. Sadurska Maria, „Doktor Mający Nadzieję”
<https://www.gdanskstrefa.com/doktor-majacy-nadzieje/2> czerwca 2022



La fotoj de Anna Elisa Tuschinski / nekonata aŭtoro/
fonto: Österreichische Nationalbibliothek, Bildarchiv

Luiza CAROL (Israelo)

TEMPO RABITA

(Radiodramo pri Lidia Zamenhof)



Alessandra Madella realigis la fotomuntadon de la teatraĵo de Luiza Carol, Jen la ligiloj de la videaj versioj de la radiodramo "Tempo Rabita" de Luiza Carol pri Lidia Zamenhof:

La unua parto: <https://www.youtube.com/watch?v=VsWeWc9Kq-g>

La dua parto: <https://www.youtube.com/watch?v=0Gw13wIGEY8>



Sceno 1.

Prezentanto: Ni troviĝas dum la dua mondmilito, unu vesperon de la jaro 1942. La loko estas unu malluma ĉambro en la geto de Varsovio. En la malforta lumo de kandelo, preĝas virino 38 jara. Ŝi estas Lidja Zamenhof, la plej juna el la filinoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Antaŭ la milito, ŝi vojaĝis multe tra la mondo, instruante Esperanton kaj prelegante pri tiu lingvo, samkiel pri la bahaa kredo. Nun ŝi sidas en angulo kaj flustras la preĝon pri feliĉo, revelaciitan de Abdu'l-Bahá. Antaŭ ol ŝi finas la preĝon, junulino 14 jara eniras la ĉambron senbrue. Ŝia nomo estas Eva.

Granda Lidja: - “Ho Dio! Refreŝigu kaj ĝojigu mian spiriton. Purigu mian koron. Iluminu miajn fortojn. Mi metas ĉiujn miajn aferojn en Vian manon. Vi estas mia Gvidanto kaj Rifugejo. Mi ne plu estos malĝoja kaj ĉagrenita; mi estos feliĉa kaj ĝojplena. Ho Dio! Mi ne plu estos zorgoplena, nek mi permesas, ke afliktoj turmentu min. Mi ne plu fiksiĝos je la malagrablaj aferoj de la vivo. Ho Dio! Vi estas plia amiko al mi ol mi estas al mi mem. Mi dediĉas min al Vi, ho Eternulo!”

Eva: F-ino Lidja! F-ino Lidja! Ĉu vi estas sola?

Granda Lidja: Mi estas sola, Eva, ne timu.

Eva: Al mi ŝajnis, ke vi parolas kun iu.

Granda Lidja: Mi nur eldiris preĝon, karulino. Preĝon pri feliĉo.

Eva: Feliĉo? Ho, fraŭlino, kelkfoje vi ŝajnas tiom stranga...

Granda Lidja: Stranga? Kial vi opinias tion, Eva?

Eva: He... Mi ne scias... Ĉu vi estis iam ajn feliĉa, f-ino Lidja?

Granda Lidja: (ridas) Hmm...Mi ĉiam estas iomete feliĉa, Eva. Eĉ kiam mi estas malgaja, ege malgaja kiel ekzemple nun... mi tamen konservas pecon da feliĉo en mia koro...

Eva: Pecon da... feliĉo? Ĉu? Mi tion ne komprenas... ..

Granda Lidja: Kara Eva, vera feliĉo estas io, kion neniu povas tutece depreni de ni...

Eva: Mi ne komprenas vin. Mi amas vin, sed ne komprenas vin.

Granda Lidja: Ho, karulino... Ĉu vi volas, ke mi rakontu al vi, kiel mi malkovris la ombrelon de feliĉo?

Eva: Vi konfuzigas min, f-ino...

Granda Lidja: Vidu, la ombrelon de feliĉo, mi ekkonis kiam mi estis 9 aŭ 10 jara... mi ne plu rememoras ekzakte la jaron kaj la lokon... ie, en iu urbo de la centra Eŭropo... eble en iu hotelo de Berno... eble aliloke... Ekde tiu tago, kiam mi volas, mi imagas min sub magia ombrelo helblua, kiel peco de serena ĉielo. Mi promenas tra la mondo, sub mia propra peceto da ĉielo. Kaj mi kapablas flugi pere de ĝi en alian lokon, en alian tempon... Kvazaŭ mi rabus la avaran tempon, deprenus de ĝi la ŝlositajn trezorojn...

Eva: Trezorojn?

Granda Lidja: Jes, mi rabas feliĉajn pasintajn momentojn, kiuj dormas en la trezorejo de la tempo. Sed ankaŭ estontajn karajn momentojn, kiujn mi esperas travivi iam... Ĉu vi volas provi? Pensu pri la magia ombrelo, kaj imagu iun vesperon, kiam vi estos plenkreska virino kaj troviĝos kune kun via edzo kaj infanoj apud la kameno, babilante trankvile kaj manĝante mielkuketojn...

Eva: Ho! Pensi pri mielkuketoj! Mielkuketoj! (ŝi ridas)

Granda Lidja: (ridas) Ĉu vi vidas? Ĝi funkcias! La magia ombrelo funkcias ankaŭ por vi! Via tuta vizaĝo radias feliĉon. Jes, jes... Tio estas tempo rabita, Eva... Feliĉo, kion oni ne povas depreni de vi...

Sceno 2. (Aŭdiĝas la valso en "la" minoro de Ŝopeno.)

Prezentanto: En la menson de Lidja, envenas rememoroj pri la feliĉa semajno, kiun ŝi pasigis en Berno en 1913, kiam ŝi akompanis sian familion al la 9a Universala Kongreso. Preskaŭ tri jardekoj pasis de tiam. La tempo koncentriĝas en ŝia menso, tiel ke ŝi ree travivas tiun semajnon en nur kelkaj sekundoj. Eva tute ne konscias pri tiu ĉi tempa retroiro en la menso de Lidja. Ilia dialogo estas nur kelkajn sekundojn interrompita per normala paŭzeto. Intertempe, Lidja vidas sin mem kiel 9-jaran knabinon, en iu hotelo de Berno. Estas suna mateno, kaj la hotelo estas dekoraciita per floroj. Eta Lidja sidas ĉe modesta vertikala piano en la salono. Ŝi pianludas la porinfanan valson en "la" minoro de Ŝopeno. Apud ŝi staras ridetanta sinjoro 53-jara,

kiu dirigentas per sia fermita blua ombrelo. Eta Lidja ne estas aparte talenta pri muziko, ŝi fuŝas fragmentojn, tamen ĝuas ludi kaj estas tre gaja. Granda Lidja alparolas Etan Lidjan en sia menso, sed tiu ne kapablas aŭdi voĉon el la estonteco.

Granda Lidja:(flustre) Eta Lidja! Lili! Kie vi estas?

S-ro kun blua ombrelo: Atentu, Lili, atentu... vi povas iom malrapidi, kaj tuj poste rapidi, tiel ke la daŭro de la tuta mezuro ne ŝanĝiĝu... Tiu artifiko nomiĝas “tempo rabita”, ĉu vi memoros? “Tempo rabita”.. mi / la si doo doo/ re mi faaaa/ si do re la sol fa/ mi re miiii... (Li daŭre parolas, sed oni ne plu distingas liajn vortojn.)

Granda Lidja: (flustre) Ĉu vi scias, kiu li estas, Lili? Tiu ĉi gaja sinjoro estas “la feliĉa Felisjeno”, la barono Félicien Menu de Ménil, unu el la amikoj de Paĉjo. Li aŭtoris muzikan terminaron en Esperanto. Kaj ĉu vi scias, kial li estas tiom feliĉa ĝuste nun? Ĉar la melodio, kiun li komponis laŭ unu el la poemoj de Paĉjo, fariĝas pli kaj pli populara kaj multaj jam konsideras ĝin “la Esperantista himno”. Eta Lidja! Ĉu vi sentas mian ĉeeston? Eta Lidja!

Prezentanto: La sinjoro eliras, lasante sian fermitan ombrelon sur la piano. Eta Lidja malfermas ĝin kaj dancas kun ĝi.

Eta Lidja: Mi estas rabanta la tempon! Mi vojaĝas estontecen... Granda Lidja! Lidja! Ĉu vi rememoras min? Ĉu vi vidas min?

Granda Lidja: (ridas) Vi nenion komprenas nun, pri kio tiu sinjoro ĵus parolis. Nur venontjare, via instruistino pri muziko klarigos al vi, kio estas “tempo rubato”. Jes, itala termino, kion fari... (ridas) Oni daŭre uzas la italan por preskaŭ ĉiuj muzikaj terminoj... (ridas) Vi estas konfuzita nun pri la ideo de “tempo rabita”. Sed vi ĵus malkovris novan ludon... tre interesan ludon... Vi vojaĝas tra la tempo per magia blua ombrelo...

Eta Lidja: Iam, mi estos plenkreska virino kaj similos Panjon. Mia edzo similos Paĉjon, kaj ni havos 3 infanojn...

Granda Lidja: Ne, Lili. Ne. Mi ne estas edziniĝinta kaj ne havas infanojn.

Eta Lidja: Granda Lidja, vi neniam perfidos min, ĉu? Vi ne forgesos plenumi miajn dezirojn, ĉu? Vi amos viajn infanojn kaj ĉiujn aliajn infanojn, ĉar vi ne forgesos min, ĉu? Ĉu?

Granda Lidja: Mi neniel perfidas vin, eta Lidja. Mi konservas en la koro tutece viajn malmensogemon kaj malkompromisemon. Vi volis, ke mi edziniĝu kun viro kiu similu Paĉjon, aŭ kun neni. Jen, mi edziniĝis kun neni. Vi volis, ke mi amu infanojn. Jen, mi ja amas infanojn kaj ankaŭ gejunulojn, kiuj laŭaĝe povintus esti miaj gefiloj, kiel ekzemple mian nevon aŭ Evan... Eva!

Sceno 3.

Eva: Jes, fraŭlino Lidja. Mi alportis al vi terpomojn.

Granda Lidja: Dankegon, karulino. Jen, mia bofratino sendas al vi ŝmiraĵon el la malsanulejo. Ŝi diris, ke ĝi taŭgos por la vundo de via patrino. Ĝi devos sufiĉi por tri tagoj, se vi uzos ĝin ŝpareme.

Eva: Dankon, fraŭlino. Kaj dankegon al via bofratino. (heziteme) Ĉu... ĉu vi pensis pri alia respondo?

Granda Lidja: Respondo? Al kio?

Eva: Vi scias... temas pri tiu maljuna pola amiko de via patro... kiu demandas vin, ĉu vi ne...

Granda Lidja: Mi jam respondis.

Eva: Li petas vin denove.

Granda Lidja: De kiu vi scias tion?

Eva: De la s-ro fervojisto... tiu, kiu sekrete alportas al ni terpomojn... Li diris, ke la maljunulo demandas denove, ĉu vi ne pretas ŝanĝi vian decidon pri...

Granda Lidja: Mi ne ŝanĝos mian decidon. Mi ne povas.

Eva: Pardonu min, f-ino. Mi ne komprenas vin. Kial vi ne konsentas savi vian vivon?

Granda Lidja: Mi ne volas riski la vivon de aliuloj por savi la mian. Vi ja scias, ke oni mortigas la polajn familiojn, ĉe kiuj oni trovas kaŝitajn judojn. Krome, mi ne povas forlasi mian propran familion, kiun mi amas.

Eva: Sed f-ino Lidja, vi eĉ ne plu estas judino. Vi estas bahaanino, ĉu ne?

Granda Lidja: Vi miskomprenas, Eva. Mi neniam ĉesis esti judino. Mi estas kaj judino kaj bahaanino. Tia mi restos, ĝis la fino de mia vivo. Mi amas miajn familianojn kaj ne povas forlasi ilin. Homoj ne perfidas siajn kredojn kiam ili fariĝas bahaanoj, samkiel ili ne perfidas siajn denaskajn lingvojn eklernante ankaŭ Esperanton. Bahaismo, laŭ mia kompreno, estas la Esperanto de la religioj. Ĝi estas por mi la realigo de tiu "homaranismo", pri kiu parolis Paĉjo. Ĝi estas la vojo al pli bona mondo...

Sceno 4. (Aŭdiĝas la valso en "la" minoro de Ŝopeno.)

Prezentanto: Lidja denove vidas sin en la menso, ludantan en la hotelo de Berno, en 1913. Ŝi vidas sin dancantan kun la malfermita blua ombrelo.

Eta Lidja: Iam, mi estos plenkreska virino samkiel Panjo. Ĝis tiam, longega tempo pasos. Ĝis tiam, la mondo fariĝos multe, multe pli bona. Tiam militoj ne plu ekzistos, malamo ne plu ekzistos...

Sceno 5.

Eva: Ankaŭ mia frato parolas ofte pri pli bona mondo. Sed mia patrino kutimas diri: "Ve... Supo en la sonĝo ne estas supo, sed sonĝo!... Pli bona mondo en la sonĝo ne estas pli bona mondo, sed pli bona sonĝo!..." (ili ambaŭ ridas)

Granda Lidja: Via patrino pravas cent procente, Eva. Sed pensu, ke sonĝo facile aliformiĝas en revon, kaj Dio donacis al la homoj la kapablon realigi siajn revojn.

Eva: Sed... se aliaj homoj havas malicajn revojn? Se ĝuste tiuj realiĝas? Mia patrino diras, ke malamo kaj malfeliĉo kreskas ĉiutage en la mondo ...

Granda Lidja: Unuflanke jes... Sed pensu ankaŭ pri la kuraĝaj fervojistoj, kiuj sekrete alportas al ni manĝaĵojn kaj kuracilojn. Pensu pri ĉiuj bravaj homoj, kiuj helpas nin... Kiel ni supervivintus ĝis nun sen ili? Kaj kion ni diru pri la herooj (jes, herooj!) kiuj riskas siajn vivojn por kaŝi judojn en siaj domoj? Kompare kun ili, mi

konsideras min kiel malkuraĝan muson...

Eva: Mia patrino diras, ke tiaj raraj herooj ŝajnas nur kelkaj gutoj de espero, kompare kun la oceano de malamo kaj krueleco ĉirkaŭ ni...

Granda Lidja: Mi kunsentas kun via patrino. Sed mi esperas, ke ĝuste tiuj “gutoj” havos la potencon ŝanĝi la sorton de la mondo. Kaj mi opinias, Eva, ke tiu “oceano de malamo kaj krueleco” estas fakte... oceano de misinformo kaj miskompreno. Mi multe vojaĝis kaj multe babilis kun ne-judoj el multaj landoj. Laŭ mi, estas tute normale kaj logike, ke oni malamu popolon, kiun la ĵurnaloj kalumnias, la radio kalumnias... Infanoj aŭdas ekde la plej frua aĝo, ke unu popolo kulpas pri ĉiuj malfeliĉoj en la mondo... Kial ili ne deziru, ke tiu popolo malekzistu? Se mi kreskintus en tia etoso, ankaŭ mi pensintus tiele... Ankaŭ vi pensintus tiele...

Eva: Mi? Neniam. Certe ne!

Granda Lidja: Jes! Certe jes! Ĉu vi ne malamegas tiujn, pri kiuj vi pensus, ke ili suferigas la tutan mondon? Vi ne povas imagi, kiom da mensogoj oni disvastigas... La homoj kiuj malamegas nian popolon scias preskaŭ nenion veran pri nia vivo kaj supozas, ke ni estas tute strangaj estaĵoj, samkiel malicaj aliplanedanoj celantaj la detruon de la tero...

Eva: Mi ne komprenas, kiel tio povas okazi...

Granda Lidja: Inter ĉiuj estaĵoj, ni, la homoj, estas la solaj al kiuj Dio donacis parolkapablon. Kaj jen kion oni faras per tiu Dia donaco: oni mensogas. Kaj jen la rezulto: homoj interkompreniĝas malpli facile ol estaĵoj malkapablaj paroli... Nu, ni tamen esperu, ke post tiom da sufero, la homaro iĝos pli saĝa...

Eva: Mi ne komprenas tion, kio okazas nun en la mondo... Mi estas tro stulta kaj malklera por kompreni...

Granda Lidja: Ne turmentiĝu, Eva. Vi tute ne estas stulta, karulino. Ne kredu, ke mi komprenas multe pli. La homa menso komprenas nur malgrandan parton el la mistero de la vivo. Ne fidu tiujn, kiuj supozas, ke ili ĉion komprenas pri la historio de homaro kaj ĉiujn problemojn kapablas solvi. Se vi jam komprenas, ke vi ne komprenas, vi estas pli saĝa ol tiuj...

(Aŭdiĝas bruoj de pezaj botoj sur la strato, kvazaŭ 2-3 viroj preterpasas la domon.)

Eva: Ili jam pasis. Mi devas foriri nun. Fartu bone, fraŭlino Lidja.

Granda Lidja: Estu prudenta, Eva. Kaj ĝoju, karulino! Ĝoju! Ne perdu la esperon! Pli bona tempo venos por ĉiuj. Pensu pri la ombrelo de feliĉo kaj... rabu la tempon! Rabu ĝin! Pensu pri via estonteco, kiam vi realigos viajn plej belajn revojn! Pensu pri tio kaj ĝoju! Ĝis revido!

Sceno 6. (Aŭdiĝas la valso en “la” minoro de Ŝopeno.)

Prezentanto: Eva eliras. Lidja vidas sin denove en la menso kiel 9-jaraĝan knabinon, daŭre paŝantan kun la malfermita blua ombrelo enmane.

Granda Lidja: Eta Lidja! Kie vi estas? Mi bezonas vin! Pli ol ĉiam mi bezonas

vin!

Eta Lidja: Mi estas kun vi, Granda Lidja. Mi iel pritimas ion, sed mi ne scias kion kaj kial... Ĉu ni preĝu kune?

Granda Lidja: Jes, ni preĝu kune.

Eta Lidja: La sola preĝo kiun mi konas estas la poemo verkita de Paĉjo: “Preĝo sub la verda standardo”. Mi parkeris la unuan strofon. Ĉu vi rememoras ĝin, Granda Lidja?

Granda Lidja: Jes... jes...

Granda Lidja kaj Eta Lidja: “Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,/ fortego, la mondon reganta,/ al Vi, granda fonto de l’ amo kaj vero/ kaj fonto de vivo konstanta,/ al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,/ sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,/ al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,/ hodiaŭ ni preĝas.”

Epilogo.

Prezentanto: Epilogo. En la jaro 1993, maljuna sinjorino respondis al intervjuo, pri siaj travivaĵoj en la geto de Varsovio. La nomo de la sinjorino: Eva Toren. Ŝi estis 14-jara en 1942. La sinjorino parolis i.a. pri la tago, kiam ŝia pli aĝa amikino Lidja Zamenhof (38-jara) estis puŝita en la trajnon, kiu portis homojn al la mortigejo Treblinka. De tie, Lidja neniam revenis.

FINO.

Notoj

En la komenco: bahaa preĝo, revelaciita de ABDO’L-BAHÁ.

En la fino: la unua strofo el “Preĝo sub la verda standardo” de Ludoviko L. ZAMENHOF.

Dokumenta bibliografio

“Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj” – kolekto de la verkoj de Lidja ZAMENHOF, eldonita de FEL, Antwerpen 2008.

“Ni vivos!” – dramo de Julian MODEST, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1987.

“La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto” de Wendy HELLER, Antwerpen 2007.


“La Zamenhof-strato” - L. K. ZALESKI-ZAMENHOF intervjuita de R. DOBRZYNSKI, Varpas, Kaunas 2005.

“Bahaismo kaj Esperanto” – publikaĵo de Bahaa Esperanto-Ligo, 2009.

“La lastaj tagoj de Lidja Zamenhof” – Josef ŜEMER, en la revuo “Israela Esperantisto” No. 113, februaro 1993.



Lidja ZAMENHOF kun ombrelo enmane. Foto de 1930.



La Barono Félicien MENU DE MÊNIL kun ombrelo enmane. Karikaturu de ĉ. 1913.



Lidja ZAMENHOF en la infanaĝo, kun ombreleto enmane. Foto de 1909.

SEKSO KAJ EGALECO



La suba artikolo estis verkita de Anna Löwenstein surbaze de sia tiutema parolado en Ranzan. Ĝi aperis en la revuo *Femina*, n-ro 13, marto 2008.

Sekso kaj Egaleco: feminisme rememori

1975 estis Internacia Jaro de Virinoj, kaj 1975 estis ankaŭ la jaro, kiam UEA la unuan fojon aktive interesiĝis pri siaj inaj membroj. Kiel kutime ĝi volis sekvi, kie UN gvidas; tial ĝi nature elektis por la 60a Universala Kongreso en Kopenhago la temon “Virinoj”. La estraro de UEA tiutempe enhavis nur unu virinan membron, hungarinon Flora Szabó-Felső, kaj ŝi estis invitita fari la festparoladon dum la kongreso – kredeble la unua (kaj ankaŭ la lasta) virino, kiu iam ajn festparolis dum kongreso de UEA.

Ĉar la esperantistoj ĉiam tre serioze okupiĝas pri la Internaciaj Jaroj deklaritaj de UN – ne gravas, ĉu temas pri homaj rajtoj, rifuĝintoj, naciaj malplimultoj, daŭra evoluado, aŭ pri virinoj – dum 1975 ili multe aktivis tiurilate. Lokaj kaj regionaj grupoj organizis kunvenojn pri la rolo de virinoj, invitis virinajn parolantojn ktp., kaj multaj artikoloj tiutemaj aperis en la esperanta gazetaro. Krome, esperantistinoj partoprenis en pluraj gravaj aranĝoj dum la jaro, inkluzive de la Forumo de Neregistaraj Organizaĵoj kiu okazis kunlige kun la oficiala konferenco de UN en Meksikurbo. Mi suspektas, ke ilia celo tie eventuale estis informi pri Esperanto, pli ol mem informiĝi pri la situacio de virinoj. Tamen tiom da diskutado pri tiu temo neeviteble influis, tiel ke finfine kreskis ankaŭ la deziro igi virinojn pli aktivaj interne de la Esperanto-movado.

Se UN deklaris la periodon 1975-1985 Internacia Jardeko de Virinoj, tio ne okazis hazarde. La situacio de virinoj estis unu el la gravaj temoj de la epoko; ĝi ŝvebis en la aero, oni legis pri ĝi ĉie. Eĉ se UEA ne estus kreinta la Komisionon pri Virina Agado, esperantisma virina agado estus okazinta same.

Mi mem eklaboris en la Centra Oficejo de UEA en la fino de 1977, kaj oni invitis min kontribui al la junulara revuo *Kontakto*. Inspirite de artikolo, kiun mi ĵus legis en nacilingva ĵurnalo, mi tuj proponis verki pri rilatoj inter virinoj kaj viroj. La sekvo estis sep-parta serio *Virinoj kaj viroj*, kiu aperis en *Kontakto* dum 1978-1979. En serio de mallongaj artikoloj mi esploris la diferencojn inter la seksoj: ĉu ili estas naturaj aŭ ĉu ili ŝuldiĝas al malsama edukado? Sekvante la tiaman opinion, kiu regis en la Virina

Movado, mi konkludis, ke la psihologiaj diferencoj inter la seksoj rezultas nur el ilia malsama traktado ekde la nasko. (Postaj sciencaj esploroj montris, ke tiuj diferencoj tamen estas pli profundaj ol ni tiam supozis – kompreneble, edukado kaj malsama traktado ja ludas rolon, sed ne pli ol hormonaj kaj aliaj fizikaj trajtoj.)

La serio vekis sufiĉan intereson – kiel mi jam klarigis, tio estis unu el la ĉefaj sociaj demandoj de la epoko – kaj ĝia sukceso kuraĝigis min revii pri eĉ pli ambicia projekto: aperigi regulan “novaĵleteron” (mi ne pensis tiam pri vera revuo) pri virinaj aferoj. La nova bulteno *Sekso kaj Egaleco* komenciĝis iom hezite per provnumero, kiu aperis en oktobro 1979. Ĝi ne estis aparte bela: ĝi estis tajpita per elektra skribmaŝino – en 1979 eĉ la CO ne havis komputilon – la artikoloj estis mane engluitaj sur la paĝoj, kaj la tuto estis multobligita per unu el tiuj stencilaj procedoj, kiuj nun fariĝis historiaj. La multobligado, cetere, estis senpage farata de Dermot Quirke en Britujo: tre grava kontribuo al la embria bulteno.

Malgraŭ sia ne tre alloga aspekto, *SkE* havis sufiĉe viglan enhavon. La artikoloj ĝenerale ne estis tre longaj; ofte ili konsistis el pluraj mallongaj pecetoj kaj leteroj pri difinita temo, ricevitaj el diversaj landoj, kiuj donis multoblan vidpunkton pri la sama demando.

Kvankam la abonprezo estis malalta, ĝi sufiĉis por ebligi senpagan sendadon al multaj virinoj en la tiamaj “nepagipovaj landoj” de orienta Eŭropo. Estis ankaŭ pluraj abonantoj en Irano kaj Japanujo. Sekve, okazis dialogo inter la legantoj el malsamaj mondopartoj: inter okcidenta kaj orienta Eŭropo, inter Japanujo kaj Eŭropo, kaj inter Irano kaj okcidento. Interesa, ekzemple, estas la artikolo “Karaj okcidentaninoj!...” de Turan Sagafi el Irano (n-ro 11, januaro 1985), kiu komentis, ke la zorgoj de la okcidentaj virinoj estas bagatelaj kompare kun la seriozaj problemoj de iranaj kamparaninoj. Alia diskuto okazis inter legantoj el la du partoj de la dividita Germanujo: tiuj en la socialisma orienta duono asertis, ke ne necesas diskuti egalecon en lando, kie virinoj jam ricevas egalan pagon por egala laboro; dum tiuj en okcidenta Germanujo rebatis, ke tamen virinoj en tiu lando ankoraŭ faras plej grandan parton de la hejmaj laboroj, kaj ke oni apenaŭ trovas virinojn en estraj postenoj.

Sed la vigleco de tiu eta, malbele presita revuo ŝuldiĝis ĉefe al la fakto, ke la virinoj, kiuj skribis al ĝi, skribis pri si mem. Ili ne verkis longajn teoriajn artikolojn pri virinoj en aliaj mondopartoj, sed varme sentatajn konstatojn pri la situacio en la propra hejmo, lernejo aŭ laborejo. Tio ne estis aparta merito de *SkE*; tutsimple ĝi reflektis la efektivan pensadon, kiu estis trovebla en amaso da virin-movadaj revuoj de tiu tempo. En la provnumero, ekzemple, Marianne Böckmann el FR Germanujo skribis:

Mi laboras ĉe banko. Kaj mi vidas la virinojn, kiuj venas por preni monon kaj diri al ni, kiom ni devas ĝiri por iu fakturo. Sed tio estas preskaŭ ĉio, kion ili faras en la banko. Se estas demandoj pri rentoj, konstruŝparkontraktoj a.s., ĉiam venas la viroj. Tion mi vidas ne nur ĉe ni en la banko, sed ĉie kaj ĉiam. Ankaŭ tre ofte en la Esperanto-movado. Se esperantisto edziĝas, la edzino tre ofte komencas lerni Esperanton kaj venas kun li al la renkontiĝoj. Sed se esperantistino edziniĝas, ŝi tre ofte jam antaŭ la geedziĝo finas kun ĉio, kion ŝi

ĝis tiam faris en la grupo.

Post la apero de la unua numero okazis tre ekscita evoluo: alvenis letero el Japanujo de du virinoj, Yamakawa Setsuko kaj Hukunaga Makiko, kiuj petis permeson eldoni *SkE* ankaŭ en la japana. Ili skribis:

Ni kredas, ke la enhavo de *Sekso kaj Egaleco* pruvigos interesa kaj instrua ankaŭ al japanaj ne-esperantistinoj, kiuj okupiĝas pri la problemoj de seksa diskriminacio. La japana gazetaro, inkluzive de diversaj gazetoj pri virinaj problemoj, informas tre malmulte pri eksterlandaj situacioj escepte de la virino-liberiga movado en Usono. *Sekso kaj Egaleco*, en japana traduko, prezentos pli larĝan perspektivon al japanaj ne-esperantistinoj.

Post tio la revueto regule aperadis ankaŭ en japana traduko, dum la esperanta versio akiris multajn japanajn legantinojn kaj kontribuantojn.

Esperantistoj kompreneble ĉiam interesiĝas pri lingvaj demandoj. Unu el la plej popularaj temoj en *SkE* estis tiu de la komunseksa pronomo en Esperanto (alivorte “li aŭ ŝi”). En diversaj numeroj de la revuo aperis pluraj proponoj: *ri*, *ĝi*, *ŝili*, eĉ *ŝi*, instigante amason da korespondado. Ankaŭ la ina sufikso estas ofta temo: ĉu oni nepre ĉiam uzu ĝin, ĉu ellasi ĝin, ĉu krei viran sufikson paralelan al la ina, ktp. Iu ajn interesiĝanta pri tiuj temoj nepre konsultu la malnovajn numerojn de *SkE*, en kiuj ili estis funde diskutataj.

SkE fariĝis la voĉo de la komisiono de UEA pri Virina Agado, kiu fondiĝis en 1974 sub la gvido de Elsbeth Bormann el Germanujo. La bulteneto konstante raportis pri la agado de la komisiono kaj enhavis artikolojn instigantajn la legantinojn al praktika aktivado. Regulaj kontribuantoj al *SkE* fariĝis ankaŭ regulaj kunlaborantoj de la komisiono. Tiutempe mi mem kaj Loes Demmendaal eniris la komisionon, kaj multe helpis la fakto, ke ni ambaŭ loĝis en Roterdamo, kaj do povis ofte renkontiĝi. Ni kovis amason da planoj kun la helpo de Eliza Kehlet, kiu en 1980 fariĝis la unua estrarano de UEA pri virinoj aferoj; interalie, en 1981 kaj 1982 okazis semajnfinaĵ kunvenoj por aktivulinoj en Roterdamo kaj Hamburgo. Dum la unua el tiuj kunvenoj, la komisiono starigis reton de kunlaborantinoj, kiuj promesis kunlabori per esplorado, verkado, prelegado, grafika laboro, tradukado kaj kontaktoj kun naciaj virinaj asocioj.

La formale deklaritaj celoj de la virina komisiono estis jenaj:

- a. Konsciigi la homojn en la Esperanto-movado pri la sociaj problemoj de virinoj;
- b. Eduki esperantistinojn superi tiujn problemojn;
- c. Serĉi kontaktojn kun naciaj virinaj asocioj;
- ĉ. Altigi la proporcion de virinoj en la Esperanto-movado.

Kvankam ni ja iugrade plenumis la trian el tiuj celoj, interesis nin ĉefe la agado interne de la Esperanto-movado. Ni konstatis, ke por plenumi la unuan celon necesas doni al virinoj la ilojn por fari tion. Kaj kiel oni disvastigas informojn interne de la Esperanto-movado? – kompreneble, per prelegado kaj verkado. Sed precipe prelegado estas ĝuste tio, kion multaj virinoj hezitas fari pro necerteco, timo paroli antaŭ publiko ktp. Tial ni opiniis, ke necesas pretigi la virinojn per kursoj pri publika parolado.

Okazis pluraj provoj pri tia kurso dum Universalaj Kongresoj, sed ili neniam estis vere sukcesaj: la grupo estis tro granda kaj la tempo tro limigita. Tial ni finfine realigis pli ambician planon okazigi seminarion pri publika parolado por virinoj, kiu okazis en la Esperanto-domo en Pisanica, Bulgarujo, en julio 1983. Jen raporto pri la aranĝo el *SkE* n-ro 11:

La seminario daŭris unu semajnon. Ĉeestis 18 kursanoj kaj kvar gvidantoj. En la mateno okazis praktikaj ekzercoj pri senstreĉiĝo, prononcado kaj spirado, kaj laŭtleĝado de preta teksto. Post kelkaj tagoj, la seminarianoj devis mem verki kaj prezenti paroladetojn, kaj reciproke komenti pri siaj prezentoj. Por helpi ilin elekti temon, ili ricevis liston de sugestoj, sed en la fino ili devis prepari antaŭfiksitan temon. En la posttagmezo estis ekskursoj en la regiono (kiu, cetere, estas mirige bela), kaj la kursanoj devis ankaŭ prepariĝi por la posta tago.

Por mi mem, se ne por ĉiuj aktivulinoj de tiu epoko, tiu seminario estis la kulmino de nia virina Esperanto-agado.

Kaj kiel finiĝis la virina agado? Parte okazis, ke la homoj moviĝis al novaj intereso. Tio estas videbla en la *SkE* n-ro 16 el januaro 1988, en kiu mi raportis, ke la japanaj kunlaborantoj de *SkE* proponis, ke mi plivastigu la temaron. Mi skribis:

Ili argumentis, ke la travivo de la planedo estas temo, kiu funde koncernas ĉiujn virinojn, kaj do devus esti traktata en feminisma eldonaĵo. [...] Mi konstatas, ke la emo plilarĝigi sian interesosferon estas aktuala trajto de la virina movado. En la inismaj revuoj, kiujn mi konas, ofte troviĝas artikoloj pri la jenaj temoj: pacismo, la nuklea minaco, rasismo, malriĉeco, sano, samseksemeco, vivmedio, ktp.

Tiu numero de *SkE* estis fakte la lasta. Mi mem intertempe transloĝiĝis de Roterdamo al Romo, naskis du infanojn, kaj havis diversajn aliajn praktikajn malhelpojn. Kvankam mi serĉis novan redaktoron, neniun transprenis – kaj efektive tiu entuziasmo kaj ekscito de la fruaj tagoj jam elĉerpiĝis. Eble unu kialo estis, ke la celoj de la internacia virina movado jam parte realiĝis, almenaŭ en okcidentaj landoj. Virinaj estroj, ĉu ŝtatprezidantoj, ĉu bankdirektoroj, ankoraŭ restas malplimulto, sed almenaŭ neniuj plu trovas ilian ekziston aparte komentinda. Virinoj povas eniri profesiojn iam fermitajn, ekzemple fajrobrigadisto, taksistoforo, aviadilpiloto, astronauto, dum viroj pli facile eniras iamajn “virinajn” profesiojn kiel flegisto aŭ infanvartejisto. Egaleco eĉ atingis la estraron de UEA, kiu dum la lasta mandato havis eĉ plimulton da virinoj.

Do, eĉ se egaleco ankoraŭ ne estas plene atingita, tiuj jaroj da premado tamen havis ioman efikon. Kaj plaĉas al mi pensi ke la virina agado interne de la Esperanto-movado estas unu el la eroj, kiuj kontribuis al tiu pli granda socia ŝanĝiĝo.

La tuta serio de *Sekso kaj Egaleco* estas nun legebla en la reto ĉe <http://www.gazetoteko.com/ske/index.html>



Foto: Anna Löwenstein rerenkontiĝas kun la iamaj kunlaborantoj de SkE dum la 40a Konferenco de ILEI en Ranzan, Japanujo, en aŭgusto 2007. De maldekstro dekstren: Anna Löwenstein, Yamakawa Setsuko, Hukunaga Makiko, kiuj montras la esperantan kaj japanan eldonojn de *Sekso kaj Egaleco*.

VIVO DE VIRINOJ EN AFRIKO



Saluton! karaj gesamideanoj:

Koncerne la temon VIVO de VIRINOJ en Afriko, ni devas scii, ke la vivo de virinoj en Afriko estas komplika kaj danĝera!!!

Kial komplika? Ĉar nuntempe estas virinoj kiuj laboras en niaj registaroj kaj havas bonajn poziciojn dum aliaj ĝis nun suferas de sendependeco, iliaj edzoj ne permesas al ili labori kaj aliaj preĝejoj diras, ke la laboro de la virino estas gardi infanojn hejme!

Terure! Do, la virino ne rajtas labori, strange! Vere tiu afero estas komplika! Kaj fariĝas danĝera kiam la edzo mortas subite, aŭ perdas laboron, aŭ havas sanproblemon samtempe la preĝejo ne plu funkcias.

Jen kio kaŭzas analfabetecon, fraŭlajn patrinojn, ktp en nia socio, ĉar la patro ne kapablas eduki la infanojn kaj zorgi pri ili! Mi parolis kun kelkaj virinoj en Afriko, por scii kiel oni konsideras la virinojn en iliaj landoj, la respondoj estis preskaŭ samaj. Vi povas imagi, ke kiam la edzo ne plu laboras, kio okazus al siaj edzino kaj infanoj! Vere estas danĝere!

Pro tio, estas multaj virinoj kiuj suferas en niaj landoj de Afriko.

Jen la kialo ke niaj virinaj grupoj ne evoluas bone. Post la instruado de la lingvo Esperanto, ĉiam la virinoj KABEAS, forlasante la movadon, ĉar ili ne trovas profiton en nia Eo-Virina grupo, ili preferas iri tie, kie oni organizas diversajn agadojn por iliaj vivtenoj.

Pro tio, ni esperantistaj virinoj planas organizi kiel aliaj virinaj Asocioj por allogo ilin al ni.

La agado ni planas organizi ĉi-jare estas:

- I. La instruado de la lingvo Esperanto
- II. Konkurso pri la legado de esperantaj libroj (jam kelkaj virinoj partoprenos la konkurson sumoo ĉi-monate.)
- III. Organizati konferencojn, kiel ekzemple:
 - entreprenemon (transformadon de manĝaĵoj, ktp.)
 - projekton pri kampo

Tiel ni povas propagandi la lingvon Esperanto al niaj samlandanoj.

Alianovaĵo:

Ni planas organizi la trian Afrikan Kongreson de virinoj decembro 2026 en Zambio precize en la urbo Livingston (turisma urbo).

LA RONDIRANTA RAKONTO “PRI VIROJ KAJ KUNIKLOJ”



Kvankan teknikaj problemoj malhelpis mian partoprenon en la reta seminario de “Virina Agado”, mi kaptas la ŝancon de tiu ĉi libreto por paroli al vi pri mia tasko en la Komisiono, la internacia kunverkado de la rondiranta rakonto “Pri viroj kaj kunikloj.” Fakte, ĝi havis la honoron esti la unua agado aprobita kaj lanĉita fare de la Komisiono, en la tago mem de sia fondo en Majo 2024. La ideo venis al mi de feminisma praktiko de virina kunverkado, kiu havas jam longan historion, almenaŭ en Usono kaj Eŭropo. Sed, ĉar ni uzas Esperanton kaj la Komisiono mem estas tre internacia, ankaŭ la skalo de nia agado pli vastas ol kutime. Fakte, partoprenis jam 34 virinoj el la 5 kontinentojn: Afriko (Madagaskaro), Ameriko (Kanado), Azio (Armenio, Barato, Ĉinio, Japanio, Koreio), Eŭropo (Francio, Italio, Kroatio, Pollando, Svislando), Oceanio (Aŭstralio). Kaj la listo pli longus, se ni konsiderus ne nur la civitanecon de la verkintoj, sed ankaŭ la landon de efektiva ĉeesto dum verkado.

La maniero partopreni estas tre simpla. Unue vi devas anonci al mi aŭ al alia membro de la Komisiono sian deziron partopreni kaj mi aldonos vin al la listo de verkemulinoj. Post tio, vi devas kutime atendi iomete, ĉar la rakonto estas iĝanta sufiĉe longa (jam estas 4 ĉapitroj!) kaj iom da tempo estas bezonata al la virinoj antaŭ vi por tralegi ĝin kaj elpensi sian kontribuon. Kiam ĝi alvenos al vi, vi povas aldoni 5 frazojn al la fino. Ili devas rilati al la antaŭa rakonto kaj daŭrigi ĝin, sed vi povas tute libere uzi vian imagkapablon por pensi kiel ĝi devus daŭrigi. Se vi volas, vi povas loke kunverki kun aliaj virinoj, ekzemple kun viaj grupaninoj aŭ kun viaj lernantinoj, se vi estas instruistino. Mi persone provis ambaŭ manierojn kaj ili estas tre amuzaj formoj de kunlernado.

Oni ofte demandas al mi, kio estas la utilo tion fari. Mi kutime respondas, ke pli ol utilo mi celas plezuron, ĉar estas ĉiam plezuriga surprizo vidi la imagoplenajn manierojn, per kiuj virina saĝo kapablas elturniĝi eĉ en la plej strangaj situacioj. La utilo tamen ligiĝas al la plezuro, ĉar la partoprenantinoj lernas multe da vortoj kaj esprimoj en tiu ĉi luda kaj malpeza maniero. Kaj precipe ili ekkonas la agadojn de nia Komisiono kaj eble interesiĝos sekvi ilin pli proksime kaj en diversaj kampoj. Do, estas kazo, en kiu utilo kaj plezuro harmonie kunekzistas, kiel kutime estas en feminismaj agadoj.

La protagonisto de la rakonto, kiu parolas en la unua persono, estas Amos, emerita detektivo, kiu en strangaj cirkonstancoj trovis plenplenan monujon. Lia ebla

koramikino (aŭ ĉu eble kor-trompistino?) estas Maja, bela junulino kun grandaj okulvitroj kaj afrikstila hararo, kiu malmulte parolas, multe frandemas kaj filozofie pensas, ke ĉio en la mondo rondas. Krome, sukcesaj karakteroj estas la bela junulo Leon, kiu petas la helpon de Amos por serĉi sian malaperintan kuzinon, kaj la maljuna kantisto Jackson, kiu ĉiam malinkonias kaj kiu ne vidis sian filon dum multe da jaroj. Ĉu Amos sukcesos solvi la misteron de la monujo, trovi la kuzinon de Leon kaj helpi Jackson denove brakumi sian filon? Ĉu li ankaŭ firme gajnos la koron de Maja kaj sukcesos zorgi pri siaj du belegaj kaj amindaj kunikloj, kiuj portas tiom da ĝojo al lia vivo?

Se vi volas scii aŭ — eĉ pli bone — se vi volas mem decidi tion, kio okazos poste, venu kunverki kun ni!!

VIRINOJ EN FLAGOJ



En la mondo estas nur 3 naciaj flagoj kie oni povas vidi kompletajn homajn estaĵojn.



Unu el ili (Belizo) havas du virojn tenantaj ŝildon, sed aliaj du estas virinoj figuroj.



Ĉiuj tri ŝtatoj situas en la Amerika Kontinento, kaj, krom menciita Belizo, estas

- British Virgin Islands Britaj Virgulinsuloj
- Montserrat Moncerato



La du flagoj tre similas ĉar ambaŭ la ŝtatoj adoptas la tiel nomata “Blue Ensign”, kiu estas blua drapo kun flago de Britio en la supra kanton, kun aldono de la ŝtata blazono en la flirtparto.

Blua flago origine estis flago de Reĝa Mararmeo (nun uzata fare de ŝipoj de la Milita Mara Rezervo) de Britio, kies ŝipoj patrolas koloniajn posedaĵojn.



Britaj Virgulinsuloj

Lokitaj en la Kariba Maro, estas “Transmara Teritorio de Britio”, kiu estas parto de Virgulinsuloj insularo, nuntempe dividata inter Britio kaj Usono.

Loĝite de indianoj Arawak, estis atingitaj en la jaro 1493 de Kristoforo Kolombo,

kiu nomis ilin “Santa Ursula y las Once Mil Virgenes” - Sankta Ursula kaj la Dek Mil Virgulinoj.

Li inspiriĝis en la legenda gvidantino de la IV jarcento, kiu estris 11 aŭ 11.000 virgulinojn kaj, oni diras, estis martirigita en Kolonjo (Germanio).



Angloj, hispanaj, francaj, nederlandanoj kaj danaj disputis por konkeri insulojn, kiuj fariĝis pirataj bazoj.

Iom post iom angloj ekloĝis en kelkaj el insuloj (aliaj insuloj formas la “Amerikajn Virgulinsulojn”, ĉar estis kolonizitaj fare de Amerikanoj), kiuj divenis en la jaro 1960 kolonio.

En la jaro 1967 Britaj Virgulinsuloj fariĝis Aŭtonoma Teritorio.



La ŝtata blazono (devenita el la blazonoj uzitaj en la XIX deknaŭa jarcento) originas ĝuste el la legendo de Sankta Ursula, kaj estis uzata unuafoje la 15-an de novembro 1960.

Verda ŝildo entenas virinan figuron (profile metita), kiu subtenas bruligantan lampon, ĉirkaŭata per aliaj dekunu lampoj. Sub la ŝildo oni povas vidi ledan rubandon kun la nacia devizo “Vigilate” (“Atentu”).

Iu kredas ke lampoj estis inuloj de insularo, sed aliaj pensas ke ili estus simbolo

de 11 aŭ 11.000 virgulinaj, kiuj akompanis Sankta Ursula.



Blanko (vesto de la Sankta) simbolas paco kaj honestecon.

Ruĝo de bruligantaj lampoj simbolas reziston, kuraĝon, forton kaj bravecon.

Blua fono simbolas gardadon, veron, lojalecon, persistemon kaj justecon.



Insulo lokita en la Kariba Maro, parto de la Malgrandaj Antiloj, estas “Brita Transmara Teritorio”.

Kristoforo Kolombo alboriĝis sur la insuloj en 1493 kaj donis al ĝi la saman nomon de monto apud Barcelono, kie staras la monaĥejo de Montserrat.



Irlandaj katolikoj forpelitaj de Anglio fare de Cromwell, ekde la jaro 1693 rifuĝis en ĉi tiu insulo, kaj unuiĝis al loĝantaroj kaj al sklavoj, kunportante sian familiajn nomojn, katolikan religion kaj irlandajn tradiciojn, kiel “Festo de Sankta Patricio”, kiun nuntempe oni festas.

Pro ŝia geografia pozicio, angloj kaj francoj batalis por konkeri insulon ĝis la jaro 1783 kiam fariĝis Brita Teritorio, kaj poste Kolonio ĝis la jaro 1967 kaj ekde tiam Transmara Brita Teritorio.

Erupcio de vulkano Soufriere Hills en la jaro 1995 devigis loĝantaron rifuĝi en la norda parto de insulo, nura nuntempe loĝebla zono.



Blazono prezentas virinon kun verda robo, kiu subtenas keltan oran harpon kaj nigran krucon.

Oni pensas ke virino estu Erin (enkorpigo de Irlando, devenanta el la Deino Eriu), dum kelta harpo rememoras irlandan originon de loĝantaro.

Granda nigra kruco simbolas la ĉefan religion, kristanismo.

Moncerato



Virino : Erin, simbolo de Irlando

Harpo : kelta simbolo de originoj de loĝantaroj

Kruco : simbolo de la ĉefa religio

Oni povas vidi sur blazono simboloj de koloniantoj, kiuj unuiĝis kun originaj loĝantaroj kaj sklavoj kiuj, iom post, iom loĝis en Moncerato

Flago estas la klasika Blue Ensign kun aldono de la ŝtata blazono, unue uzita ne 1909, sed oficiale adoptita sur flago en 1960.

En la jaro 1999 flago estis modifita por pliigi grandecon de blazono mem forigante ĝian blankan cirklon lokita malantaŭ ĝi,

Blua fono simbolas konsciecon, fidindecon, determinadon kaj rektanimecon.

Moncerato



1909 : aperis flago

1960 : flago estis oficiale adoptita

1999 : flago estis modifita kiel vi vidas ĝin hodiaŭ

Buo (fono de flago) : konscieco, fidindeco, determinado kaj rektanimeco

KOMENTOJ EN LA BABILEJO



Ardo: Ni indas memori, ke brita frua esperantistino kaj misiistino Isabella Mears aktivis en Ĉinio dum 1890-1893. Interesito b.v. skribi al 76858775@qq.com
Anticipan Dankon!
Longarko: Ili meritas rememorigon!

Vas_nema*:

Aŭskultante la voĉon de virinoj, Mi pensas, ke mi devas pensi pli. Pri virino kaj laboro

Tridek kelkajn jarojn antaŭe, kiam mi edziĝis, tiam estis nature pensi, ke ĉe la geedziĝo virino ĉesas labori.

Se en iu familio ambaŭ edzo kaj edzino laboras ekstere, oni pensas, ke la viro suferigas sian edzinon per laboro kaj tion oni rigardis kiel honton de viro. Antaŭ edziniĝo, mia edzino estis instruanta pianon. Sed ĉe la geedziĝo, ŝi fermis sian piano-instituton lasante nur unu pianon, kiun uzos poste espereble ankaŭ miaj idoj.

Se mi lasus tiam mian edzinon daŭrigi sian laboron (nur hodiaŭ mi komprenas ĝin ne en la senco de laboro, sed de kariero aŭ de la ŝanco ensocie sian personon trovi), mi estus kalkulita kiel viro, kiu havas povon subteni sian propran familion.

En la nuna tempo, inter la juna generacio, fariĝis jam normala kutimo ke ambaŭ havas sian laboron.

Dank' al la vortoj de iu samideanino, mi ekrimarkas, ke ĉesigo de laboro povas esti fortranĉi la flugilojn kaj enfermi la virinon en karceron izolitan de la mondo. Kaj tiel igas virinon troviĝi ĉiam finance en lia dispono. (Tion ĉi mi komprenas nur nun)

Mia filo, simile al sia patro, senbezoniĝis la laboron de sia edzino. Sed male kontraŭ sia patro, li pli vaste malfermas al ŝi la pordon al la mondo. Studi pli en univ., Provi diversajn licencojn. Feliĉe, ke li ne imitas sian patron.

***noto:** Sinjoro PARK Yong Sung « NEMA » el Sud-Koreio

Vas_nema: Antaŭ longe, kiam mi laboris en multnacia kompanio, mi vizitis Ĉinion. La unua ŝoko estis, ke tie en la kompanioj, en fabrikoj troviĝis multaj virinaj gvidantoj, laboristoj. (En Koreio, tiam tia sceno ne estis kutima.)

Venis de ĉinio klientoj, kiuj faros superrigardon de la maŝino. Kaj inter ili troviĝis junaj sinjorinoj, kiuj okupiĝis tiam per komputilaj aferoj. Oni nomis ilin per la titolo 'inĝeniero'.

Mi memoras la tempon, kiam mi miris ĉe la vido de ŝoforino de taksio. Kiam mi iris ŝipkonstruejon kaj vidis sinjorinon laborantan kun helmo sur sia kapo.

La scenoj ankoraŭ nun restas en la angulo de mia memoro, ĉar al miaj okuloj 'virina laboristo' ne estis facile imagebla tiam.

Mi estas antikvaĵo, kies penso estas ankoraŭ katenita en la epoko, kiam la mondon regas viro, kiu amas forton.

Vas_nema: Mi ne devis iri en kuirejon, ĉar mia avino tion ne permesis. "Se vi enirus kuirejon, ŝi diris, estus perdita via simbolo de la vireco" 😊

Anna Lowenstein: Bonŝance la aferoj ŝanĝiĝas! Mi esperas, ke ankaŭ en via lando.



Arko el Ĉinio: Ĝoĝan naskiĝtagon al Anna!




Svetlana Pogorelaja: Grandan dankon pro la kortuŝa aranĝo!




Yamakawa Setsuko: Mi estas unu el la eldonantoj de la japana Sekso kaj Egaleco. Ni prezentis ĉefe artikolojn de Esperanta SkE, kaj ankaŭ interesajn artikolojn el aliaj Esperantaj gazetoj, ekzemple Kontakto kaj Monato. Ni esperas, ke ni povis labori kaj agadi kiel perantoj inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Dankon al Anna pro hodiaŭa parolado!


Ilia (Indonezio) :
Interesa prelego!
Dankon

FOTARO









Mirejo preparis sin por longa programo...



n Mirejo

Preskau ni chiuju!!!! 🤔🤔🤔🤔



2025/3/10/

Karaj Amikinoj,

Mi ankoraŭfoje dankas pro preparado de nia sabata programo okaze de la Internacia Tago de Virinoj!! Ni sukcesis kvankam estis kelkaj momentoj dum kiuj aperis duboj... Ni do kreas bonan teamon, kiu bele kunlaboras.

Mi kore dankas al Mirejo, ke ŝi kunigis nin per WhatsApp. Tio helpis al ni pli rapide entrepreni decidojn dum “krizaj” situacioj de nia sabata programo... Aplaudon por Mirejo pro ŝia teknika zorgo pri nia programo!!!

Mi kore dankas al Arko pro ŝia helpo prepari bildforme la prelegon de Martha!

Mi dezirus, ke ni ankaŭ klopodu same forte kaj bele kunlabori preparante duontagan programon kadre de la Komisiono por Virina Agado. Al mi ege plaĉas la propono de Arko pri arta programo... Bonvolu, karaj, pripensi nian programon dum UK. Kion vi atendus; kion vi volus spekti; kion vi povus prepari? Mi petas, ke vi skribu viajn la unuajn pensojn, ideojn... Poste ni elektos tiujn, kiujn ni povos plenumi...

Karaj Amikinoj, ne estas tro multe da tempo por prepari nian artan programon. La tempo pasas tre rapide kaj mi proponas jam komenci pensi pri nia partopreno en UK. Certe kelkaj el vi prelegos pri seriozaj temoj dum “specialaj program-blokoj” kaj tial tiun Arko-proponon ni traktu liberforme...

Ni jam invitas partopreni en la programo de la Komisiono por Virina Agado kadre de ĉijara Universala Kongreso en Brno.

Ĉion plej bonan.

Kore.

Małgosia Komarnicka